



Unum ovile et unus pastor.  
Unu ŝafejo kaj unu paŝtisto.  
(Joh. X., 16.)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO. OFICIALA ORGANO DE LA INTERNACIO  
KATOLIKA.

---

## Esperantistoj preĝas.

Flamigitaj de sankta fervoro,  
Ne timantaj malhelpojn, oferojn,  
Ĉiuj pretaj, renkonti suferojn  
Por sukceso de nobla celad',  
Ni jam ĵuris: Ne homa plu gloro  
Sur la tero disigos homaron,  
Ne plu homoj la homan idaron  
Oferdonos al frato-buĉad'!

Ni ĝin ĵuris. Alia ĵurado  
Al la nia respondas agorde:  
Jen, la trupoj al trupoj, plenorde,  
De la homoj, sub verda standard',  
Jam aliĝas por frata celado,  
Kortuŝite nun donas la manojn,  
Por defendi de l' homoj infanojn  
Kontraŭ malama terura la ard'.

Ĉar la lingvoj nur ŝajne dividas  
Familion, la homan, per rasoj  
Kaj homgloro la homojn, per klasoj,  
De senĉesa batalo la font'!  
Ni esperas kaj forte konfidas,  
Ke la lingvon komunan ŝatantoj,  
Reciproke sin home amantoj  
Bataladon ĉesigos pro hont'.

Kaj, preĝante al Vero, Kreinto,  
Vere amanta homaron la tutan,  
Dio, irinta por ĉiuj la krutan  
Sur Golgota'n krucvojon al mort',  
Ni petegas de l' mondon Savinto  
Novan forton, ke Li kun favoro  
Donu benon al pia laboro  
Nun kaj ĉiam plenumon laŭ vort'.

Ho, Sinjoro, favora, bonvola!  
Jen, klinite al trono de gloro,  
Ardan preĝon ni diras en ĥoro  
Por de Esperantaro la bon':  
Benu nin, ke la fido konsola  
Regu ĉiam en koroj firmitaj!  
Benu nin, ke post bone finitaj  
Laboradoj ni staru ĉe l' tron'!

Trento (Italujo).

Originale verkis Mario Paicher.

---

## Kristaneco kaj la nova tempo.

La tuta homaro similas al malsanulo, kiu turnadas sin en doloroj kaj ne povas trovi ripozon. Fortega febro terure turmentas ĝin. Febro estas, ĝi mem, ne malsano, nur certa signo de malsan-stato en korpo kaj efekto de tia malordo. Sed el kie la malsano venis kaj kiuj estas ĝiaj kaŭzoj? Observante la homaron depost kelke da generacioj, ni trovas, ke ĝi vivis en malsana aero kaj enspiris venenajn bacilojn, kiuj produktis la nunan teruran situacion. Kaj ĝia malsano ne estas unu- sed multspeca.

La ĉefa inter la malsanigiloj estas sen-Dia egoismo, kiu aperas sub diversaj formoj, speciale kiel kapitalismo. Ĝi estas por la homaro malbona spirito, idolo, adorata de milionoj, malestimata de pliaj milionoj. Kiel sovaĝa besto ĝi ekkaptas grandan parton de homoj, kaj pli kaj pli kreskas ĝia formo, pli kaj pli grandigas la nombro de ĝiaj oferoj. Malmultaj personoj (en Eŭropo proksimume 300) estas la kapitalistaj grandsinjoroj, kiuj per mono ĉenas la tutan terglobon. En iliaj manoj la ŝtatestroj estas nur marionetoj kaj la ceteraj homoj nur komerc-objektoj. La kapitalismo konas nek moralon, nek honoron, nek fidelecon. Ĝi estas egoismo en la plej akra formo; ĝi havas nur unuopan celon — monprofito. Individua kapitalismo kontraŭstaras la Kristanan doktrinon, ĉar „Kristaneco kaj kapitalismo estas en sama interrilato, en kia estas fajro kaj akvo“ (Pesch, S. J.). — Aliajn formojn de egoismo, kiu iom post iom konsekvence mortigas la homaron, ni ekkonas en imperialismo, en ŝovinismo kaj tronaciismo, kies fruktojn ni klare kaj detale vidis dum la lasta milita kaj postmilita tempo. La verkistino Ellen Key prave skribis: „La religio de la XX<sup>a</sup> centjaro estos naciismo.“ Pri la milita imperialismo, kiu estas nur efekto de persona kaj ŝovinisma egoismo, antaŭ kelke da dekjaroj iu Germana pensulo bone rimarkis: „Se historio lernigis ion, dum la du pasintaj generacioj ĝi lernigis malkonfidon je ĉiuj milit-efektoj, sed plue neceson de juste moralaj principoj. Ĉu ni eble penadis je filozofio pro tio, ke ni fine trovu la solvon de ĉiuj enigmoj en sabro?“

Egoismo en diferencaj specoj kaj krom ĝi aliaj kaŭzoj produktis en la homaro la nunan febron, kiun kelkaj kuracistoj volas forigi.

Ili preparas kuracilojn, sed la malsanulo ne resaniĝas, ĉar iliaj iloj ne havas forton, forigi la kaŭzojn de la malsano. Ili similas al homo, kiu akvomakulon sur ĉambro-plafono nur supergluas per ia kovrilo, sed ne rebonigas la trarompitan tegmenton. Ne socialismo en ĝia nuna formo resanigos la homojn, sed viva, praktika Kristaneco. Nur tiu ĉi posedas verajn ilojn por ĝisradika kuracado. Ne iu mekanika, materialeca -ismo povas kontentigi la postulojn de malsana tempo, ĉar ĝi konsideras nur homan eksteron, ne la animon kreitan de Dio.

Sed, kial Kristaneco ne jam ĝis nun helpis kiel kuracisto, kial ĝi ne jam de longatempe kontraŭbatalis egoismon per forta mano,

kial ĝi ne kontraŭstaris la militon ktp.? Ĉu Kristaneco ne staras antaŭ bankroto?

Kiu juĝas laŭ eksteraj signoj kaj ne pripensas la cirkonstancojn, povas pensi tion. Sed antaŭ ĉio tiu riproĉo koncèrnas la kontraŭulojn de Kristaneco, ĉar ili malhelpis per diversaspecaj nemoralaj rimedoj efektiviĝon de la Kristana doktrino. La vera kuracisto de la homaro estis repuŝata en angulon, ĉenata kiel sklavo aŭ krimulo. Kaj nun la kontraŭuloj ekkriis: „Kie estas la doktrino de Kristo pri reciproka amo kaj paco, kie estas la papo, ke li devigu la ŝtatestrojn al finigo de milito?”

Sed ankaŭ ni Kristanoj estas riproĉindaj, kaj ne lastavice. Ofte ni estis kaŭzo, por ŝajnigi en la okuloj de kontraŭuloj Kristaneco-bankroton per nia nemorala vivmaniero. Kiom da veraj Kristanoj fakte ekzistas sur la tero? Multaj milionoj de homoj estas troveblaj en la statistiko kiel anoj de la Kristana eklezio, sed kiom da ili meritas la nomon Kristano? Kiom da katolikoj sentas vere katolike, vere ne egoiste, vere internacie? Nuntempaj katolikoj ofte tro intermiksas religion kun politiko. Ne nur de politika agemo, de nia interna, anima reformiĝo dependas la resaniĝo. Kutime ni juĝas Kristanecon de iu persono laŭ ĝia aliĝo al iu Kristana politika partio. Ni forgesas, ke popolmaso ne agas laŭ politika programo sed prefere laŭ materia profito; politiko estas por ili „afero de stomako“. Krom tio la plej bona politika programo estas senvalora, kiam mankas modela persono en ĝia realiĝo. Kompreneble, la katolikoj ne tute devas flankelasi politikon. Se ĝis nun ankaŭ religiaj personoj ne ĉiam konsentis kun iu Kristana partio, la kaŭzo estis ĝia neperfekta programo, kiu ne kontentigis iliajn postulojn. Por ni katolikoj de la venonta tempo valoru nur la politiko de Kristo, kiu estas internacia kaj kontraŭ-kapitalista.

La katolikismo enhavas grandajn kaj nemorteblajn ideojn. Estas vero, ke ili povas esti repremadataj dum kelke da tempo, sed eksiĝi ili ne povas. Kelkaparte nia tempo memorigas je la periodo de la Romana estreco. Tiutempe la Kristana vivado floradis, spite la persekutado pro Kristo-doktrino. La tiutempaj Kristanoj realigis la Dian idealon en la plej perfekta maniero. Ili ne nur scikonis Kriston, sed ankaŭ vivis Kriston. Ilia vivo devas esti laŭesence la modelo ankaŭ por nuntempaj katolikoj.

Tial ni sentu nin kiel veraj fratoj en Kristo, ne nur en unu lando sed sur la tuta terglobo, tial ni batalu kontraŭ la diversaspeca egoismo en ni mem kaj en la koroj de aliaj. Tiamaniera katolikismo estas vera kaj perfekta socialismo.

La nuna tempo certe alportis kelkajn malhelpilojn por publika Kristaneco, sed aliparte ĝi ankaŭ liberigis la eklezion de kelkaj ĉenoj. Se ni katolikoj organizos nin en agemaj unuiĝoj, se ni ne dispartigos niajn fortojn, se ni komencos senti vere internacie kaj malegoiste, ni ne bezonos timi la novan tempon. Ni gardu nin kontraŭ troa konservemismo. Ni pripensu, ke nova tempo postulas alimaniemajn ilojn kaj dirojn. Bedaŭrinde tro ofte ni similas

al homo, kiu per brulo perdis sian malnovan domon sed intencas rekonstrui ĝin en sama formo, ne pripensinte, ke la nuntempa konstrumaniĝo kaj la stilo jam ne koincidas kun la antikva. Aliformita estas la ekstero, aliformita la aranĝo de ĉambroj ktp. La nova tempo devigas ankaŭ nin, alimaniere plenumi nian spiritan kaj religian reformiĝon. Ni ne elektos novan fundamenton; tiu restos la de Kristo destinita. Ni ne uzos novan konstrumaterialon, ĉar tia povas esti nur la spiritaj iloj de nia eklezio. Sed ni konstruos sur la antikva loko per ĉiam valoraj aĵoj en moderna maniero. Tiam ankaŭ ni katolikoj estos „framasonoj“, konstruante spiritan templon por la homaro, tiam ni efektiviĝos la devizon »liberté, fraternité, égalité«, sed laŭ la ideoj de nia Dio-majstro kaj laŭ la deziro de la eklezia doktrino.

Ni katolikaj Esperantistoj komencigu en la katolikaro tian movadon. Estu ni pra-Kristanoj en moderna vesto. Ni ne ĝemu ĉiam pri pasinta tempo sed komencu, ree konstrui sur ruinoj. Do, ni praktiku internacian kaj socian katolikismon!

/Pro Ludoviko Koller,\*) O. S. B.

## Sciigoj de la Centra Administra Oficejo de „Ika“.

### La delegito-sistemo.

La provizora Detala Regularo, dissendita al la direktoraro de „Ika“ antaŭ kelke da semajnoj por voĉdono, estas akceptita laŭ ĝenerala ĝia enhavo. La definitiva laŭteksta kaj laŭenhava fiksado okazos la plej bone per speciala komisiono dum la venonta kongreso. CAO publikigos laŭbezzone kaj laŭokaze kelkajn ĉefajn partojn el ĝi, por klarigi la programon kaj montri la praktikan labormanieron.

La starigo de delegito-sistemo estas tasko necesega, ĉar ĝi estas praktika institucio kaj pro tio ankaŭ tre taŭga varbilo. Plue, la laboro nacia kaj internacia pliiĝas preskaŭ ĉiutage. „Ika“ bezonas multegon de kunlaborantoj. Saĝa divido de la laboroj laŭ modernaj metodoj sendube estas necesa. Tia divido estas ebla en du direktoj: loka kaj faka labor-divido.

Loka delegito estas kvazaŭ la „Ika“-direktoro de lia urbo. Li ne nur devas doni informojn kaj okaze fari al vojaĝantoj malgrandajn servojn personajn. Ho ne; en saĝa subordiĝo kaj ĉiama interkonsento kun lia nacia direktoro li devas organizi la laboron en lia loĝloko, varbi novajn membrojn, interesi la katolikajn societojn, unuiĝojn, klubojn, informi la katolikajn ĵurnalistojn, gvidantojn ktp.

Grandan taskon havas la naciaj fak-delegitoj, ĉar la tuta katolika agado nacia kaj internacia per si mem dividiĝas en ĉefajn fakojn aŭ movadojn, ekz. laborista, junula, virina, metiista, kamparana, socia, moraleca, porpaca

\*) La aŭtoro de ĉi tiu teksto eksiĝis, je grava bedaŭro de la direktoraro de „Espero-Katolika“, kiel redaktoro por la nuna jaro pro trookupateco per al'aj laboroj.

k. s. Ni devas klopodi, trovi iom post iom por ĉiu speciala movado en ĉiu lando fakan delegiton. Tiu precipe devas varbi kaj interesi la koncernajn fakajn organizaĵojn en lia lando, publikigi klarigojn en la fakaj gazetoj ktp. Ĉiuj fak-delegitoj enlandaj kune kun la lokaj delegitoj estas per si mem provizora nacia labor-komitato. Aliflanke, per la internacia kunligo de ĉiŝtataj fak-delegitoj unu movado (ekz. la virina) de si mem naskos provizoran internacian komitaton por la koncerna labor-amplekso. Do, la plej baldaŭa starigo de la delegito-sistemo estas urĝa tasko.

Jen, sekvos la ĉefaj provizoraj reguloj por la delegito-sistemo laŭ la Detala Regularo de „Ika“. La adresoj de la delegitoj estos publikigataj en la oficiala organo de „Ika“ kaj tiam en la internacia adresaro. Do, ĉiu, kiu estas ema, kunlabori, bonvolu anonci sin ĉe lia nacia direktoro aŭ ĉe CAO. La „Ika“-kuponoj, menciitaj en la Detala Regularo, estos eldonataj, kiam la ĝusta momentó por tio ŝajnos veninta.

### La ĉefaj reguloj por „Ika“-delegitoj.

La starigo de sistemo de „Ika“-delegitoj en ĉiuj pligrandaj lokoj de la mondo estas precipa tasko de la naciaj direktoroj kaj de CAO. La delegitoj estas, kune kun la individuaj membroj, la unuaj kaj la plej gravaj apogantoj de „Ika“. La loka delegito estas la reprezentanto de „Ika“ en lia loĝloko.

Elektio: a) de lokaj delegitoj: Se ekzistas 10 aŭ pli da „Ika“-membroj en unu loko, ili rajtas, elekti lokan delegiton. Por aliaj lokoj loka delegito estu destinata de la ĉef-sekretario de „Ika“ regule laŭ la propono de la nacia direktoro aŭ konsente kun tiu.

La nomo kaj la adreso de delegito estas publikigataj en la organo de „Ika“. Se la delegito estas destinata de CAO, la nomigo estas deviga ne pli ol 2 semajnojn post la publikigo en la organo de „Ika“, supoze, ke dum tiu tempo neniu protesto venis, Pri tia la direktoraro decidu.

b) de lokaj fak-delegitoj: En la ĉefurboj de pli grandaj regionoj praktike estu destinataj fak-delegitoj por la diversaj fakoj de la katolika agado. Ili estas submetitaj al la loka delegito, kiu destinas la amplekson de ilia laboro por la helpo kaj la informo-servo. Estas dezirinde, ke ĉiu granda katolika fak-organizaĵo proponu tiajn delegitojn. La elekto de la fak-delegitoj fariĝu laŭ propono de la loka delegito per la nacia direktoro. La lokaj fak-delegitoj estu publikigataj en la adresaro de „Ika“, same kiel la lokaj delegitoj.

c) de naciaj fak-delegitoj: Estas dezirinde, ke estu destinataj laŭ propono de la naciaj direktoroj aŭ la naciaj komitatoj de „Ika“ naciaj fak-delegitoj por ĉiu fakoj de la katolika agado por la plej grandaj enlandaj organizoj. Se la ĉefaj fak-organizaĵoj aliĝis al „Ika“ kiel ordinaraj aŭ eksterordinaraj membroj, ili mem proponas delegiton por la koncerna fakoj. Se ekzistas nacia komitato, ĉiuj naciaj fak-delegitoj estas membroj de tiu komitato.

d) de ĉef-delegitoj: Se ekzistas bezono, „Ika“ povas destini ĉef-delegitojn laŭ propono de la naciaj direktoroj, por provincoj aŭ por urboj kun pli ol duono da miliono de loĝantoj.

Ĉiuj delegitoj estas elektitaj por du jaroj. La ofico de delegito estas honora; tamen la elekto estu ne nur honorigo, sed mandato al laboro.

Por la jar-kunveno de la membroj, dum kiu okazas la elekto de la delegito, la tagordo estu nomata en la invito. Se kunvenis malpli ol 5 membroj, la elekto fariĝu per skriba cirkulero. Ĉiam estas elektata tiu, kiu atingis la plej multajn voĉojn. Se la elekto fariĝas per skriba cirkulero, tiam valoras nur la voĉoj alvenintaj interne de 8 tagoj de post la forsendo de la cirkulero. La adreso, al kiu la voĉoj estu sendataj, estu alia ol tiu de la ĝistiam delegito, la plej bone la adreso de la nacia direktoro.

Devoj: Ĉiu delegito klopodas, akceladi la interesojn de „Ika“, precipe ankaŭ disvastigi Esperanton. Li interrilatas kun la varbitaj membroj en lia urbo (regiono) kaj kunvenigas ilin laŭbezzone (almenaŭ unufoje ĉiujare). Li fondu lokajn grupojn, enkasigu la membro-kotizojn kaj peru ilin al CAO aŭ, se tio ne estas ebla, al la nacia direktoro, dum 14 tagoj.

Specialaj taskoj estas:

a) Informoj per leteroj. La delegito havas la devon, respondi demandojn de „Ika“-anoj, kaj ĉiam en Esperanto, interne de 8 tagoj post la ricevo de la demando, supoze, ke por la respondo la sendkostoj estis aldonitaj kaj la respondo ne postulas eksterordinaran penadon. La kompensoj de la poŝtkostoj devas fariĝi per „Ika“-kupono, kiu je la kalkulo kun Ikaco povas esti uzata de la delegito kiel nacia valuto. Legitimacio pri membreco estas kuponoj de „Ika“, kiujn la loka delegito fordonu nur al membroj de lia labor-amplekso (Pri la „Ika“-kuponoj sekvas detalaj informoj).

b) Persona help-servo. Al „Ika“-anoj, kiuj legitimacias sin per „Ika“-membrokarto, la delegito faciligas restadon per servoj ĉiuspecaj laŭpove. Akcepto de vojaĝantoj en la stacidomo, persona gastigo, prizorgo de la pakajo kaj aliaj servoj super la mezuro de malgrandaj servoj, nepre ne apartenas al la devo de delegito. Se li tamen klopodas laŭpove, helpi en la spirito de vere Kristana amo kaj helpemeco, li rajtas, konsideri prudente sian personan helpeblecon, profesion, familion ktp.

Se delegito forestas de lia loĝejo, li zorgu, ke fremduloj facile povu sciigi pri lia adreso, la tago de lia reveno ktp., la plej bone per afiŝo sur la dompordo. Se eble, li destinu anstataŭanton (vic-delegiton) por la tempo de lia foresto. Aliflanke, vojaĝantoj sciigu ĝustatempe la tagon de ilia alveno (almenaŭ 24 horojn antaŭ tiu).

La delegito restas loka delegito, ĝis kiam nova delegito estas elektita aŭ ĝis kiam li mem rifuzis la oficon per skriba sciigo al la nacia direktoro aŭ al CAO. Eksiĝo de delegito ne valoras pli frue ol 2 monatojn post lia skriba sciigo pri ĝi.

c) Servo per informoj. La delegito promesas ankaŭ, laŭpove preni sur sin nacian kaj internacian servon per informoj. Li komunikos gravegajn okazintaĵojn de la katolika vivo, precipe de la „Ika“-movado en lia urbo (regiono), al naciaj informejoj kreataj en ĉiuj landoj. Li respondas laŭpove demandojn kaj enketojn de nacia aŭ internacia informejo pri la katolika vivo. Se ekzistas lokaj fak-delegitoj por la diversaj fakoj, li komisiu al la fakuloj la inform-donon por specialaj demandoj.

Rajtoj. La delegito rajtas, morale reprezenti „Ika“ en lia labor-amplekso. Li povas rifuzi servojn, kiuj necesigas eksterordinaran penadon, aŭ postuli por tiaj servoj konvenan kompencon. Plue, li rajtas, rifuzi informojn

per leteroj, se mankas la „Ika“-kupono. Se ne-membroj de „Ika“ postulas servon de delegito, li estas libera, akcepti aŭ malakcepti tion.

La delegito ne rajtas, fari negocojn, starigi kontraktojn ktp. en la nomo de „Ika“.

La delegito rajtas, reteni 10 procentojn de la sumo super la abonprezo de la oficiala organo de „Ika“ por lia dispono kaj 5 procentojn de ĉiuj donacoj kolektitaj de li por „Ika“ por la laboro de lia labor-amplekso aŭ por lia loka grupo.

Plendoj. En kazoj de plendo kaj disputo pri la ĝusteco de la postulita kompenso decidas la prezidanto de „Ika“. En kazoj de ne-prizorgo de la delegito-devo oni skribu al la nacia direktoro aŭ al CAO. Supoze, ke la plendoj estas pravaj, nova delegito povas esti destinata de la ĉef-sekretario laŭ propono de la nacia direktoro.

„Ika“-kuponoj. CAO rajtas, eldoni, nur por la internacia skriba kaj informo-servo, specialajn kuponojn (Ika“-kuponoj) por po 0.1 aŭ 1.0 Sm. Tiaj kuponoj povas esti aĉetataj de la naciaj direktoroj (komitatoj) en nacia valuto.

La naciaj direktoroj disdonas ilin al la lokaj delegitoj, kiuj rajtas, disdoni ilin al „Ika“-membroj de ilia labor-amplekso.

La kupono valoras nur, subskribite de la membro, kun la loko de lia loĝo, kaj nur unufoje.

CAO akceptas tiajn kuponojn kiel repagon en la nacia valuto de la posedantoj, la kupono do estas faciligo de la internaciaj interrilatoj de „Ika“-membroj.

---

## Por subteni la „Ika“-movadon.

CAO en Graz ricevis mon-donacojn de: Lia Nuncia Moŝto E. Pacelli en München, Bavarujo, 100 Mkoj. — Sro A. Alessio en Padova, Italujo, 100 Loj. — Laborista Unuiĝo Esperantista „Studado post Laborado“ en 's Hertogenbosch, Nederlando, 1000 Aŭstr. Koj, kaj Katolika Esperanta Grupo „Unueco“ kaj instruista unuiĝo en Leschnitz, Germanujo, 202.85 Mkoj.

Koregan dankon!

---

## La „Ika“-movado en Litovujo.

Sub la eminenta gvidado de Lia prelata moŝto A. Dombrauskas en Litovujo nia movado laboras tre vigle. Nacia komitato kaj delegitoj diversa-specaj estas destinitaj.

Nacia komitato: Sro S. Tijunaitis, membro de la Litovuja parlamento, Sro Ap. Opulski, gimn. instr., Sro P. Maĉernis, instr. en pedagogiaj kursoj, Sro Mažejka, oficisto.

Fakaj delegitoj:

Junula movado („Moka“): Sro Blažys, Kaunas, seminario.

Instruista fakó: Sro Ap. Opulski, Kaunas, Dánkanto g. 10.

Virina fako: Fno O. Virbikaite, Kaunas, „Saules“ seminario.

Laborista fako: Sro Pr. Sulaitis, Kaunas, ŝtata tipografiejo.

Karita fako: Pro P. Vaitiekunas, Kaunas, paroĥejo.

Abstinenca fako: Pro Marma, Kaunas.

Scienca fako: Prel. A. Dombrauskas, Kaunas, Gr. Vilnastr. 34.

La listo de ĉiulandaj „Ika“-delegitoj aperos en „E. K.“.

---

## La Nacia Katolika Bonfaro-Komitato en Norda Ameriko.

(The National Catholic Welfare Council.)

Dum la pasinta centjaro la homaro eniris tute novan periodon de evoluo. La teknika kaj la scienca progreso grandparte forigis la limojn de ŝtatoj kaj subigis la embarasojn kaŭzatajn de montaroj kaj de oceanoj. Dum kelke da semajnoj la modernaj homoj povas travojaĝi la tutan ter-rondon, dum kelke da tagoj disvastigi siajn ideojn inter la nacioj per telegrafo kaj telefunko. Malgraŭ la teruraj militoj kaj la naciaj disiĝoj komencas nova periodo de internacia kunevivo. Fakte jam nuntempe la grandaj problemoj de la religia, la kultura, la socia vivo fine ne estas decidataj de unuopaj parlamentoj kaj registaroj sed la plej ofte de internaciaj kongresoj, de organizoj kaj de la tutmonda ne-Kristana gazetaro.

Internacia estas nuntempe ankaŭ la batalo por kaj kontraŭ la Eklezio. Ni vidas ĉiutage pli klare, ke du grandaj partioj tutmondaj estas formiĝantaj: la armeo de Kristo kaj la armeo de Antikristo. En ĉiuj landoj oni kolektas la katolikajn fortojn, oni serĉas novajn formojn de organizo, por energie kontraŭbatali la grandajn potencojn ne-Kristanajn. La plej admirinda kaj plej interesa entrepreno tiuspeca sendube estas la „Nacia Katolika Bonfar-Komitato“ (The National Catholic Welfare Council) en Norda Ameriko. Fondita dum la fino de la 1919<sup>a</sup>, nuntempe ĝi estas la plej ganda kaj la plej efika organizaĵo de la tutmonda katolikaro.

Sub la aŭtoritato de la Nord-Amerika episkoparo la nacia komitato ampleksas ĉiujn fakojn de enlanda katolika agado. Ĝia celo estas, krei per interligo de ĉiuj naciaj katolikaj fortoj „unuigitan korpon“ de la katolikoj, konsistantan el la laikaro kaj la pastraro. La tuta organiz-amplekso estas dividita en kvin ĉefajn sekciojn: la eduĉa, la gazetara kaj publikigista la leĝa kaj leĝdona, la katolika socia agado kaj fine la laikaj organizoj. La kvar unue nomitaj ĉefe estas studaj kaj organizaj institucioj, por disvolvi la planojn kaj montri la vojojn de agado. La laikaj organizoj estas la funkcia organo, por energie kaj celkonscie realigi la trovitajn planojn kaj vojojn. Ili konsistas el du grandaj partoj: konsilantaro de viroj kaj konsilantaro de virinoj katolikaj. Ĉiuj kvin ĉefaj sekcioj estas tute memstaraj por siaj fakaj laboroj kaj havas propran estraron gvidatan de unu enlanda episkopo kaj propran sekretariejon, kie profesiaj pastroj-oficistoj kaj laikoj laboras. Ili studas kaj organizas la laboron de ilia speciala agad-amplekso. Cetere, la unueca kunlaborado de la tuta granda organizo estas sufiĉe kaj praktike certigata, por ebligi komunan agadon en realigo de grandaj katolikaj taskoj enlandaj, ekz. konservado de la katolikaj lernejoj, ĉar la menciitaj ĉefaj sekcioj memstare estas ligitaj al la ĝenerala nacia katolika komitato formita el la estraroj sekciaj. La afergvid-



anta organo de la ĝenerala komitato estas la „administrata departemento“, kiu gvidas la Centran oficejon en Washington. Tiu ampleksas samtempe la supre nomitajn departmentajn-sekretariejojn kaj tiamaniere la plej simple kaj praktike unueca administrato kaj kunlaboro en la tuta katolika movado enlanda estas ebligita.

La administra komitato estas la centra organo; ĝi plenumas la administrajn aferojn de la tuta entrepreno. Ĝia ĉefa sekcio estas la „ekzekutiva departemento“, enhavanta po unu reprezentanton de la kvin sekcioj. Ĝi efektivas la unuecan kunlaboradon kaj prizorgas la realigon de gravaj komune katolikaj taskoj. Precipe ĝi preparas kaj aranĝas naciajn fak-konferencojn por la diversaj katolikaj movadoj sub gvidado de la episkoparo.

La eduka departemento studas la tutan problemon de la eduka kaj la instrua agado katolika. Ĝi klopodas precipe, doni pri la edukaj kaj la lerneaj ŝtatleĝoj kompletajn informojn al la episkoparo, inspektoroj k. s., klarigi al la publiko la katolikajn principojn de edukado, fondi en ĉiu ŝtato fak-organizon, por subteni la katolikajn lernejojn, zorgi por sufiĉa edukado de katolikaj instruistoj, publikigi verkojn, broŝurojn, jarlibrojn k. s.

La leĝa departemento precipe penadas, reprezenti la katolikajn principojn en la parlamentoj. Ne estante politika aŭ partia organizo, tamen ĝi sukcesplene garantias influon de la katolikoj al la leĝoj kaj la registaroj.

Pli interesa estas la departemento de la socia agado. Kvankam fondita nur dum Marto 1920<sup>a</sup>, tamen ĝi tre vigle ekagadis. Precipe ĝi klopodas, disvastigi kaj propagandi la katolikajn principojn kaj ideojn pri la societa, la industria kaj la socia kunvivo. Plue, ĝi serĉas, solvi praktike la problemon de la katolikaj enmigrintoj. Dum ses monatoj ĝi aranĝis 123 sociajn kursojn kaj 14 grandajn konferencojn; ĝi publikigis grandnombre flugfoliojn kaj librojn. Do, ĝia ĉefa tasko estis ĝis nun praktika socia edukado de ĉiuj klasoj. Plue, ĝi efike kunlaboras kun la jam ekzistantaj karitaj kaj sociaj unuiĝoj kaj institucioj.

Vere admirinda kaj bonege organizita institucio estas la departemento por la gazetara, publikigista kaj literatura movado katolika. Dum la plej mallonga tempo ĝi realigis anstataŭ la antaŭa „Katolika gazetaro-asocio“ (Catholic Press Association) kompletan katolikan gazetaro-servon kun regula informado pri la tuta katolika agado en- kaj eksterlanda. En preskaŭ ĉiuj ŝtatoj de la mondo oni destinis kunlaborantojn kaj estigis interŝanĝo-servon. Per unueca kunlaborado en unu granda centra oficejo katolika la gazetaro-servo estas multege faciligata.

Ĉefa praktika tasko estas la organizado de la katolika junularo en sportaj kluboj kaj organizaĵoj sub la gvidado de katolikaj viroj, ĉar la sporto en Norda Ameriko estas ne nur „sporto“ sed precipe ankaŭ celkonscia kaj praktika eduk-laboro. Tiamaniere la katolika junul-movado havis grandegan sukceson tra a tuta vasta ŝtataro.

Kvankam la nacia katolika komitato en Norda Ameriko ekzistas nur depost unu jaro, tamen ĝi faris grandegan progreson. Fakte nuntempe ĝi regadas la tutan katolikan agadon kaj post kelke da jaroj ĝi estos la plej forta kaj eble la plej influhava inter la tutmondaj katolikaj institucioj. Sendube, tiu entrepreno estis pli facile realigebla en Norda Ameriko ol eble en la „malnova“ Eŭropo. Ĉar tie la katolikoj ĝis nun ne estas disŝiritaj en politikaj partioj ofte kontraŭ-batalantaj unuj la aliajn, tie ne ekzistas tiom da specialaj katolikaj fak-organizaĵoj ĵaluzaj unu kontraŭ la alia. Tie oni povas fondi novajn societojn kaj unuiĝojn kaj de komenco aligi ilin al la unueca katolika movado enlanda. La celo, t. e. la komuna kunlaborado de ĉiuj katolikaj fortoj sen diferenco de partioj kaj nacioj, la organiza formo, nome la „demokrata“ vojo, kiu respektas la plenan memstarecon de la aliĝintaj organizaĵoj, kaj la praktika laboro, nome komuna nacia centra oficejo por la tuta agado enlanda, sendube estas admirindaj institucioj. Oni memoru, ke „Ik<sup>a</sup>“ klopodas laŭ ĝia Detala Regularo la fondon de „naciaj komitatoj“ en ĉiuj landoj, por unuiĝi ĉiujn katolikajn organizaĵojn al realigo de la komunaj taskoj enlandaj, kaj oni ekkonos la admirindan progreson en la katolika movado Nord-Amerika. Sed ne nur admiri — imiti: tio estas la tasko. K. M-r.

\* \* \*

Rimarko: Detalajn sciigojn pri tiu ĉi temo enhavas broŝuro „The National Catholic Welfare Council“, Washington, 1920.

## Anglaj Katolikaj Organizaĵoj.

(Daŭrigo de la publikigoj en la Januaro-numero.)

1. The Catholic Social Guild, Oxford, Anglujo.
2. Celo: Promocii la studadon de sociaj temoj inter la katolikaro.  
Rimedo: Eldonaĵoj, studaj rondoj, lekcioj kaj sociaj laboradoj.
3. Septembro 19 9.
4. Nacia administra komitato estas elektata de la membroj dum la ĝenerala jarkunveno. Ekzistas ankaŭ regionaj studaj kluboj kaj branĉoj, kiuj havas multe da aŭtonomio. La gildo ne reprezentas specialan ŝkolon: ĝi estas nur katolika kaj propagandas ĉefe la instruon de la Papo Leono XIII<sup>a</sup>.
5. Edukadi eminentularon de katolikaj laboristoj tra la lando, kaj levi per eldonaĵoj la normon de socia scio en la katolikaro.
6. 1500.
7. The Christian Democrat, monate 2 pencoj aŭ jare 2 ŝilingoj kaj 6 pencoj afrankite. 5000 abonantoj.
8. Nur katolika.
9. Ĝi interŝanĝas eldonaĵojn kun samspecaj katolikaj societoj en aliaj landoj kaj donas sciigojn al fremdlandanaj demandoj.

1. The Knights, Standmaids and Pages of the Blessed Sacrament, Manresa Press, Roehampton, London.

2. Promocio de ĉiusemajna komuniĝo kaj de kavalireca servado por Nia Sinjoro en la Sanktega Sakramento. Ĉiusemajna komuniĝo estas deviga

por membroj. Ĉiu membro pli ol 13-jara povas registri aliajn. Tiel la organizaĵo disvastiĝis en la plej malproksimaj partoj de la mondo.

3. 1915.

4. Devigaj kunvenoj kaj specialaj preĝoj ne ekzistas. La servado estas individua, deviga nur laŭ la parolo de honoro. Ĉiu membro, kiu havas provizon de atestoj kaj insignoj, estas nomata sekretario. Iujn fojojn, laŭ propra volo, distrikta kunveno de membroj okazas, nomata „Rally“ (reekfortiĝo).

5. Ĝi popularigis ĉiusemajnan komuniĝon kaj promociis ĉiutagan komuniĝon, liberigis dormantan fervorecon kaj donis kavalirecan malavare direkton al Kristo-servado.

6. Proksimume unu miliono (enkalkulataj kardinaloj, ĉefepiskopoj, episkopoj kaj multe da sacerdotoj kaj laikoj).

7. La ĉefa organo estas Stella Maris, eldonata en Angla lingvo ĉiumonate. Jarprezo 2 ŝilingoj kaj 6 pencoj afrankite. Kelkaj katolikaj ĵurnaloj en diversaj partoj de la mondo donas lokon por notoj pri la movado. „Stella Maris“ havas proks. 60.000 abonantojn.

8. Nur katolika, ĉar ĉiusemajna komuniĝo estas deviga.

9. Ĝi havas membrojn en preskaŭ ĉiuj partoj de la mondo, kiuj korespondas kun la centra oficejo. La celo estas, pligrandigi fervoron kaj tiel helpi bonfarojn. La devo neniel malhelpas la devojn de aliaj organizaĵoj sed iom helpas ilin per promocio de kavalireca malavareco en Dio-servado.

10. Leteroj ricevitaj de la centra oficejo el ĉiuj partoj de la mondo montras, ke la movado sukcesis en ĝiaj celoj.

1. The Catholic Prisoners Aid Society, 25 Claverton street, Pimlico, London, SW 1.

2. Aldoni al la help-laboro de la nunaj societoj por helpo al liberigitaj malliberuloj per provizo de konvenaj stimuliloj por mem-plibonigo al katolikaj eks-malliberuloj; viziti kaj helpi la katolikajn membrojn de familioj de malliberuloj, provizi katolikan edukadon por iliaj gefiloj ktp.; helpi liberigitajn malliberulojn per trovo de laboro por ili, per livero de vestaĵoj ktp.; helpi iamaniere katolikojn arestitajn aŭ akuzitajn kaj kondamnitajn aŭ ne.

3. 1918

4. La societo estas nacia kaj konsistas el prezidanto, vic-prezidantoj, katolikaj kapelanoj de malliberejoj, administrantaro kaj konsilantaro (la supre skribitaj kaj 20 membroj elektitaj dum la jarkunveno).

5. Dum la 1919<sup>a</sup> la societo helpis 326 virojn kaj 192 virinojn. Je la fino de tiu jaro

135	viroj	kaj	87	virinoj	pliboniĝis,
26	„	„	44		estis ree rekontentigaj,
24			13		„ rekondamnitaj,
138			37	„	perditaj el vido,
1				„	mortis,
1	„	„	11	„	eniris malriĉulejon,
1				„	lunatikulejon.

6. Proks. 300.

7. Nur la jar-raporto.

8. —

9. Kelkfoje la societo korespondas kun fremdlandaj societoj, ekz. La patronage du libérés en Paris kaj la societo de Sta Vincento de Paŭlo. Hampton Wick.

F. Hóokham,  
„Ika“-direktoro de Britujo.

## La Nederlanda katolika studentaro.

Nederlando posedas kvin universitatojn; Tri el ili, tiuj en Groningen, Utrecht kaj Leiden, estas subtenataj de la Nederlanda ŝtato, la; du ceteraj estas en Amsterdam: la urba universitato kaj la libera universitato de la ortodoksaj Protestantoj.

Katolika universitato ne ekzistas en Nederlando; sed oni jam kolektis multe da mono por fondo de speciala katolika universitato, kiu estas intencata en Nijmegen. Krom tiuj Nederlando posedas diversajn alispecajn altajn lernejojn, nome: teknika altlernejo en Delft, lernejo por best-kuracistoj en Utrecht, agrikultura altlernejo en Wageningen, reĝa militista lernejo en Breda kaj altlernejo por komercistoj en Rotterdam.

Nur la lernantoj en la supre nomitaj institutoj estas „studentoj“ gimnaziaj lernantoj en Nederlando ne estas nomataj studentoj.

La katolikaj studentoj estas plej grandaparte organizitaj en katolikaj studento-grupoj. Tiaj ekzistas ekz: Veritas en Utrecht (212 membroj), St Aŭgustinus en Leiden (107), St Thomas en Amsterdam (274), Alb. Magnus en Groningen (42), St Virgilius en Delft (190), St Ignatius en Breda (13), St Laurentius en Rotterdam (72) kaj St Franciscus Xaverius en Wageningen (19).

Tiuj grupoj laboras sukcese por la spirita kaj la scienca bono de ilia, membroj; ili estas kunligitaj per unu forta Unio kun speciala sekretarioj Sro Dro G. Brom, St Anna Straat 185 en Nijmegen. La Unio eldonas ĉiusemajnan gazeton: „Roomsche Studentenblad“, (Roma Studenta Gazeto).

La tuta nuntempa Nederlanda studentaro konsistas el:

1438 juristoj,	inter ili	205 katolikoj (14%)
2266 kuracistoj	„	257 (11%)
1030 natursciencaj	„	65 (6%)
760 literaturaj	„	67 (9%)
2101 teknikaj	„	188 (9%)
279 agrikulturaj	„	19 (7%)
460 komercaj	„	72 (14%)
222 militistaj	„	33 (16%)
179 bestkuracistoj	„	36 (15%)
Do, inter 8735 studentoj estas		932 katolikoj (10.67%).

Ĉar la katolikoj en Nederlandanoj estas 30% de la loĝantaro, la 10.67% de katolikoj inter la studentaro do estas tre malalta nombro.

La kialo de tiu malgrandnombreco estas, ke multaj katolikaj junuloj en Nederlando fariĝas sacerdotoj. Plue, la katolikaj familioj estas regule la plej infanriĉaj, tial ĉiu infano havas ne multe da mono por elspezi, kaj studado kostas multege. Fine, dum multaj jaroj la katolikoj estis subpremitaj,

precipe en la sciencaj rondoj. Tiu laŭplana subpremo estis ankaŭ la kialo de malmulto de katolikaj profesoroj.

Tamen, se la antaŭsignoj ne trompos, la katolika scienca rondo kreskos kaj florados pli kaj pli. Se la katolikaj aferoj daŭros progresadi, kiel dum la pasintaj jaroj, oni baldaŭ ne parolos plu pri la Protestanta Nederlando, kies Protestantismo disfalas en centojn da sektoj.

Dum multe da jaroj la katolikoj en Nederlando dormadis; ili kaŝis siajn sentojn en la preĝejoj kaj en iliaj domoj, sed tiu tempo nun estas pasinta; ili estas vekigitaj kaj montras sin ĉie. Ili havas siajn proprajn katolikajn lernejojn kaj siajn katolikajn gazetojn. Kaj la tempo jam ne estas malproksima, kiam ekzistos ankaŭ speciala Katolika Nederlanda universitato.

H. Kemme, Del. de „Moka“.

## Letero el la Sankta Lando.

Depost mia lasta letero la plej ĝojigaj okazintaĵoj eble estas la rekomenco de katolikaj pilgrimadoj, la publikigo de katolikaj revuoj kaj la jubileofestoj de Sta Josefo, la patrono de la Eklezio.

Ĉirkaŭ la fino de Decembro pasintjara la sanktaj lokoj de Palestino estis vizitataj de 26 Amerikanaj pilgrimantoj gvidataj de la episkopoj de Toledo (Ohio) kaj El Paso (Texas). Ili edifis per sia sincera pieco kaj sia viva kredo, tirante al si ĝeneralan atenton, ĉar tiu estis la unua religia pilgrimado post la tutmonda milito. Kompreneble, ili estis personoj de alta klaso, ĉar nuntempe ne estas eble al ĉiu ajn alia, pagi la grandajn vojaĝelspezojn dum tri monatoj. Ĝojplene tiuj pilgrimantoj suferis ĉiujn kontraŭaĵojn ne eviteblajn en fremda lando dum longedaŭra vojaĝo.

Post la vizito de Nazareth, Kana, Tiberias, Kapernaum, la montoj de Tabor kaj Karmel, ili finis sian pilgrimadon per belega dankservo en la kapelo de la ĉi tiea Germana hospico. Plaĉu al Dio, ke dum la nuna jaro alvenu multe da plujaj pilgrimantoj katolikaj, por konservi kaj fortigi la Kristanan karakteron de la Sankta Lando meze de tiom da judaj enmigrintoj.

Ĝis la 1921<sup>a</sup> la Sankta Lando posedis nenian ĵurnalon aŭ revuon katolikan. Ekzistis la fame konata „Revue biblique“ de Dominikanoj kaj „Jerusalem“ de Aŭgustenanoj, sed ambaŭ publikigitaj en Francujo. Sed je la komenco de la nuna jaro aperis en Araba lingvo sub la aŭspicoj de lia patriarka moŝto Barlassina la ĉiusemajna gazeto „Gardisto de Siono“, kaj la ĉiumonata revuo Franciskana „Terra sancta“ en eldonoj Itala, Franca kaj Hispana, ĉiuj presataj en la presejo de la Franciskanoj en Jerusalemo. La unua interesas precipe la katolikojn Palestinajn, la ceteraj la Eŭropajn per informoj pri la sanktejoj kaj aliaj rimarkindaĵoj en Palestino.

Decas, ke Sta Josefo estu honorata specialamaniere en lia patrujo. Tial lia patriarko ordonis, ke la 50-jara jubileo de lia patronado de la Eklezio estu solenata en ĉiuj Palestinaj preĝejoj per eksterordinaraj festoj kaj per ĝeneralaj komuniigoj, precipe en Bethlehem, Nazareth kaj Jerusalemo, urboj sanktigitaj per la vivo de Sta Josefo. Lia moŝto intencas, persone ĉeesti la ĝeneralan komuniigon en Bethlehem (19<sup>a</sup> de Marto) en Nazareth (12<sup>a</sup> de Aprilo) kaj en Jerusalemo (la sekvontan dimanĉon).

Haifa, 7. 3. 1291.

P.E.S.

## Preĝoj dirotaj surgenue post la soleno de privata meso.

(O f i c i a l a t e k s t o.)

**Saluton, Mario,**

gracoplena; la Sinjoro estas kun vi; benata vi estas inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via korpo, Jesuo. Sankta Mario, Dipatrino, preĝu por ni pekuloj, nun kaj en la horo de nia morto. Amen. (Tri fojojn.)

**Estu salutata, reĝino,**

patrino de mizerikordo; vivo, dolĉo kaj espero nia, estu salutata. Al vi ni krias, ekzilitaj idoj de Evo. Al vi sopiras ni ĝemantaj kaj plorantaj en ĉi tiu valo de larmoj. Ho, advokato nia, viajn kompatemajn okulojn do al ni ekturnu. Kaj, post nia nuna ekzilo montru al ni Jesuon, la benatan frukton de via korpo. Ho milda, ho pia, ho dolĉa Virgulino Mario.

Petu por ni, sankta Naskintino de Dio.

Ke ni fariĝu indaj je la promesoj de Kristo.

**Ni preĝu.**

Ho Dio, rifuĝo nia kaj forto, ekrigardu indulge la popolon petegantan al vi; kaj per la propeto de la gloregata kaj senmakula Virgulino Mario, la Naskintino de Dio, de la sankta Josefo, ŝia edzo, kaj de la apostoloj Petro kaj Paŭlo kaj de ĉiuj sanktuloj, elaŭdu kompateme kaj favore la preĝojn kiujn ni diras por la konvertiĝo de la pekuloj, por la liberigo kaj plialtigo de nia sankta patrino, la Eklezio. Per Kristo, nia Sinjoro.

Sankta Miĥaelo ĉefanĝelo, defendu nin en la batalado; estu vi protekto kontraŭ la malico kaj la insidoj de la diablo. Dio lin forkomandu; ni petegas humilege: kaj vi, princo de la ĉiela militantaro, reĵetegu, per la Dia forto, al infero la satanon kaj la aliajn malicajn spiritojn, kiuj vagadas tra la mondo, por pereigi la animojn.

Plej sankta koro de Jesuo, kompatu nin. (Tri fojojn.)

---

## Du rezolucioj de la unua nacia katolika kongreso Esperantista en Italujo.

1. La Italaj katolikaj Esperantistoj kunvenintaj en sia unua kongreso en Bologna, la 3<sup>an</sup> ĝis la 5<sup>a</sup> de Oktobro 1920<sup>a</sup>, aŭdinte raporton de prof. Pro Modesto Carolfi, Franciskano, pri Esperanto en seminarioj, proponas

1<sup>e</sup>, ke tiu lingvo estu instruata en ĉiuj katolikaj seminarioj,

2<sup>e</sup>, ke ĝi estu instruata ankaŭ en la lernejoj dependantaj de la pastraro.

2. La Italaj katolikaj Esperantistoj kunvenintaj en sia unua kongreso en Bologna, Oktobro 1920<sup>a</sup>, stariginte dum tiu okazo sian Italian Esperantan Katolikan Unuiĝon (IKUE), deklaras la oportunecon, ke super la naciaj Esperantistaj organizaĵoj estu internacia institucio, kia estis IKUE, kiu povus esti kreata en la interno mem de „Ika“, kaj ili deklaras, ke tiu opinio estu pritraktota dum la estonta VII<sup>a</sup> internacia katolika kongreso en Graz.

## Universala Kongreso por la tutmonda Katolikaro.

De la 7<sup>a</sup> ĝis la 11<sup>a</sup> de Aŭgusto 1921 en Graz (Aŭstrujo-  
Stirio).

La episkoparo kaj la Kongreso.

Ekleziaj eminentuloj diverslandaj kaj diverslingvaj salutis kun granda ĝojo nian proponon, aranĝi Internacian Katolikan Kongreson, almembrigis al la internacia honora komitato starigota por ĝi kaj subtenas bonvole nian laboron.

Lia Kardinala Moŝto Henr. Almaraz y Santos, la arĥiepiskopo de Sevilla (Hispanujo), Lia Eminenca Moŝto J. F<sup>to</sup> Ernest Ricard, la arĥiepiskopo de Auch (Francujo), Lia Eminenca Moŝto Dr<sup>o</sup> Aug. Fischer-Colbrie, la episkopo de Kaŝovio (Ĉeĥoslovakujo), Lia Eminenca Moŝto J. O. Fallize, la episkopo de Elusa, Apostola vikario de Norvegujo, Lia Eminenca Moŝto Dr<sup>o</sup> C. Kmetko, la episkopo de Neutra (Ĉeĥoslovakujo) estas inter tiuj altrangaj protektoroj de la VII<sup>a</sup> en Graz.

### III. Komuniko.

Aliĝoj: 1. Sr<sup>o</sup> Knopf, Beuthen, O/S; 2. Sr<sup>o</sup> J. Döttl, Passau; 3. Sr<sup>o</sup> G. Nivard, Groningen; 4. Sr<sup>o</sup> N. Bubalo, Mostar; 5. Sr<sup>o</sup> Bartal, pastro, Ujhartyán; 6. Sr<sup>o</sup> Heilker, Hoofddorp; 7. Sr<sup>o</sup> Dr<sup>o</sup> A. Giesswein, Budapeŝto; 8. Sr<sup>o</sup> Egger, prof., Innsbruck; 9. Sr<sup>o</sup> F. Zotty, Wien; 10. Sr<sup>o</sup> K. Zotty, Wien; 11. Sr<sup>o</sup> Jungwirth, kort. kons., Lödersdorf; 12. Sr<sup>o</sup> N. Boda, Oberpullendorf; Sr<sup>o</sup> F. Albino, London; 14. Sr<sup>o</sup> R. P. Philippe, Brüssel; 15. Sr<sup>o</sup> Dr<sup>o</sup> M. J. Metzger, Graz; 16. Sr<sup>o</sup> K. Mayr, Graz; 17. Sr<sup>o</sup> H. Sappl, Graz.

Donacoj: Sr<sup>o</sup> Heilker, Hoofddorp, 1000 Aŭstr. K<sup>o</sup>j.

Garantia Fundo: Sr<sup>o</sup> Heilker, Hoofddorp, 12 Hol. Guld<sup>o</sup>j;  
Misia societo „Blanka Kruco“ 20.000 Aŭstr. K<sup>o</sup>j.

Hans Sappl,  
kongres-kasisto.

**Provizora programo de la „Moka“-konferenco:**

1. Malfermo per la prezidanto.
2. Referato pri la celo ktp. de „Moka“.
3. Referato de la ĝen. sekretario pri la praktika laboro ktp.
4. Diskutado.
5. Proponoj.
6. Elekto de la prezidantaro.
7. Ferma parolo de la nov-elektita prezidanto.

## XIII. Universala Kongreso de Esperanto de la 31. Julio ĝis la 6. Aŭgusto 1921 en Praha, Ĉeĥoslovakujo.

### VII. Komuniko.

**Kotizaĵo:** 5 Dolaroj, 12 Ned. Guld<sup>oj</sup>, 20 Ŝil., Skand. K<sup>oj</sup>, Germ. Mk<sup>oj</sup>, 25 Fk<sup>oj</sup>, Liroj, Dinaroj, Drakmoj, Leonoj, Pesetoj, Ĉeĥosl., Aŭstr. aŭ Hung. K<sup>oj</sup>, Polaj kaj Finnaj Mk<sup>oj</sup> (ĉio laŭ antaŭmilita valoro). Esperantistoj aliaŝtataj pagas 25 Franc. Fk<sup>oj</sup><sup>n</sup>. — Pluaj samfamilianoj pagas nur 60% de la kotizaĵo. — Post la 1<sup>a</sup> de Junio la kotizaĵo estas je 50% pli alta. La kotizo en nuna ŝtata valuto estu sendata en rekomendita letero al la ĝenerala sekretario.

**Aliĝoj:** Ĝis nun aliĝis el Ĉeĥoslovakujo 82, Germanujo kaj Nederlando po 23, Francujo 12, Polujo 10, Hispanujo 8, Bulgarujo 5, Aŭstrujo 4, Hungarujo 3, Danujo 2, Svisujo, Svedujo, Danziga respubliko kaj Algerujo po 1.

**Garantia fundo:** Gesamideanoj, garantiu almenaŭ 100 Ĉeĥosl. K<sup>oj</sup><sup>n</sup>.

**Donacoj:** S<sup>no</sup> Mammen (Grenaa) kaj ŝiaj skoltaj lernantoj pluajn 113 Kĉ., S<sup>ro</sup> Jung (Horrem) 30 Kĉ., S<sup>ro</sup> Friedrich (Koŝice) 400 Kĉ., skolto Larsen (Grenaa) 3 Kd., S<sup>ro</sup> Riedl (Jilemnice) 25 Kĉ., S<sup>ro</sup> Bünemann (Hamburg) 8 Germ. Mk<sup>oj</sup>, S<sup>ro</sup> Simonek (Chicago) 1000 Kĉ.

**Loĝado:** Pri loĝado en privataj familioj kaj komunaj loĝejoj (por ne riĉaj Esperantistoj) deziro estu anoncata en la aliĝilo sendota al la Loka Kongres-Komitato. — Por hotelĉambroj nuntempe estas la prezoj en Praha: 1<sup>a</sup> kategorio: unulita 10—37 (dua proviz. lito 10—20), dulita 25—77 ĉK.; 2<sup>a</sup> 10—29 (10) resp. 26—50 ĉK. — Por manĝo: 1<sup>a</sup> kategorio: matenmanĝo 10—15, tagmanĝo 45—75, vespermanĝo 25—65 ĉK.; 2<sup>a</sup> 5—7 resp. 33—37 kaj 25 ĉK. Krom tio 10% servo-mono. En restoracioj tag- aŭ vespermanĝo 10—20 ĉK.

**Vojaĝo:** La sekvonta komuniko informos pri la bilet-prezoj por la gravaj fervojoj Praha'n.



Glumarkoj oficialaj (3 dukoloraj malsamaj specoj): 1 ekz. 10 ĉ heleroj, 100 ekz. kun afranko 10 ĉK., eksterlanden 3 Franc. Fk<sup>oj</sup> aŭ egalvalora valuto en rekomendita letero. Mendu tre baldaŭ!

Korespondo: Ne demandu pri ne-kongresaj aŭ aferoj jam komunikitaj, por ne malriĉigi la kongres-kason. Aldonu respond-kuponon aŭ ne uzitajn naciajn poŝtmarkojn!

Aug. Pitlík,  
ĝen. sekr., Praha, III., Nerudova 40.

\* \* \*

Sciencistaj fak-raportoj. Dro St. Kamaryt, profesoro ĉe reallernejo en Bratislava (Ĉeĥoslovakujo), Tělocvičná 3, organizos raportojn pri la ĝis nun atingitaj rezultatoj en la Esperanta faka scienca terminologio, prelegatajn de fakuloj de koncernaj sciencoj dum kongresa kunveno. Kolegoj estas petataj de li pri sciigo, pri kia scienca terminologio ili estus pretaj, raporti li mem raportos pri la ĥemia fako. La raportoj estos eldonataj kiel instrua lingva verko de Esperanto. Proponoj kun respond-kuponon aŭ ne uzitaj poŝtmarkoj estu adresataj laŭ la supra adreso.

## Al la vizitontoj de la XIII<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto en Praha.

Multaj Esperantistoj certe decidis jam, veturi Budapest'on, Graz'on, Dresden'on aŭ aliloken. Multaj samideanoj, veturontaj el malproksimaj landoj al la kongreso, kredeble deziras, tiuokaze viziti la iaman ĉefurbon de Aŭstrujo. Multaj kongresanoj eĉ nepre devos travojaĝi kaj restadi tie. La Esperantistaro en Wien preparos ĉion, por bone akcepti ilin kaj kiel eble plej agrabligi ilian restadon.

Precipe la tagoj antaŭ la Universala Kongreso (la 28<sup>a</sup> kaj la 29<sup>a</sup> de Julio) kaj la tagoj post ĝi (la 6<sup>a</sup> ĝis la 10<sup>a</sup> de Aŭgusto) estos la plej taŭgaj por tiaj vizitoj. La fremdlandaj samideanoj do estas korege invitataj, aranĝi siajn antaŭ- aŭ post-kongresan vojaĝon tiamaniere, ke ili povos restadi dum tiuj tagoj en Wien kaj anonci la tagon (ev. horon) de ilia alveno kiel eble plej frue, por ke la akcepta komitato ĝustatempe povu zorgi pro loĝigo. Ĉiu samideano ja ankaŭ en Wien estos kore kaj kontentige akceptata.

Projektata estas komuna veturado el Wien Praha'n, eventuale post la kongreso el Praha Wien'on.

Dum la tagoj de alveno de gastoj akcepta komitato estos en ĉiuj Wien'aj stacidomoj, kaj en la centro de la urbo estos akceptejo kaj informejo.

Samideanoj, dezirantaj viziti Wien'on, bonvolu tuj sciigi pri tio la estron de la komitato. Ĉiu sin anoncinto ricevos cirkuleron kun detalaj informoj. Ĝis revido en Wien!

Por la akcepta komitato de la Esperanto-Delegitaro de Wien:

Hugo Steinhauer, Wien, II., Böcklinstr. 8.

# La Problemo de Lingvo Tutmonda kaj Historio de la Katolika Esperanto-Movado.

(Daŭrigo.)

Kiel Ameriko jam estas eltrovita de Kristoforo Kolombo kaj ne povas ree esti eltrovata de iu alia mondvojaĝanto, tiel ankaŭ la estonta unu mondlingvo jam estas fakto ne neigebla kaj plu ne bezonas esti dezirege sopirata kaj serĉata de iu alia homo. La unu komuna lingvo de la estonta unuigita tutmonda homaro estas Esperanto, la granda verko de D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof.

Zamenhof mortis la 14<sup>an</sup> de Aprilo 1917 en Warszawa, kie li estis entombigata la 16<sup>an</sup> de Aprilo. La Warsaw'aj Esperantistoj akompanis la ĉerkon al tombejo: la humila klientaro de la Hebrea kvartalo en laborvestoj, multaj junuloj dankemaj, multaj geviroj kortuŝitaj.

Al tiu vasta rondo familia, kies delegitoj ĉiujare lin akklamis en kongresoj, la limoj restis fermitaj. Nur kelkaj Poloj, Grabowski, la poeto Belmont, Germana ŝipestro Neubarth, povis diri adiaŭon en la nomo de tiu ĉiulanda popolo, kiu lin amis kaj priploris en la tuta mondo. De registaro, neniu. Honorigo, nenia.

Efektive mortis nur la homo, la 58-jara viro, la malriĉa okulkuracisto. Sed restis viva la granda verko, kiun li kreis. Ankaŭ la inspiro el animo pura Tio ne povas morti. Malaperos la registroj, malaperos la malgrandaj granduloj, kiuj lin ignoris. Sed eterne vivos kaj diskreskos ĉie lia sema penso. Iam dekmiloj da homoj sanktigos lian nomon. Iam tuta homaro rekonos lin gvidanto al frata repaciĝo.<sup>36)</sup>

## Esperanto kaj la Katolikoj.

Tri gravaj antaŭjuĝoj.

Estas tute klare, ke tiu komuna lingvo, „la Latino de la demokratio“, jam disvastigita en ĉiuj regionoj de la mondo, povas esti la unusola efika interkomprenilo ankaŭ por religia societo disvastigita en la tuta mondo, kia estas la katolika Eklezio. Tamen, komence oni opiniadis en katolikaj rondoj, ke la klopodoj por enkonduko de unu komuna internacia lingvo estas bataliro kontraŭ la katolikismo.

Oni asertis unue, ke la malamikeco de la Esperanto-movado kontraŭ la Eklezio sin montras jam per la rifuzo de la lingvo Latina. Sed tiu ĉi rifuzo estas kaŭzata nek de kontraŭ-religia praktiko nek de politiko malamika kontraŭ la Eklezio. La Latina lingvo ne estis lingvo tutmonda, eĉ ne tut-Eŭropa, ankaŭ ne tiutempe, kiam la influo de la katolika Eklezio estis la plej granda. Cetere, la Eklezio mem eĉ sur plej propra ĝia teritorio — la liturgio — ne postulas ekskluzivan uzadon de la Latina lingvo, ĉar, por soleni

Diservojn, ĝi permesas ankaŭ uzadon de aliaj lingvoj, ekz. de la malnov-Greka, Siria, Ĥaldea, Kopta, Armena, malnov-Slava k. a.<sup>37)</sup>

En katolikaj rondoj oni plue sin sentis ofendita de tio, ke la kreinto de Esperanto D<sup>ro</sup> Zamenhof estis hebreo kaj ke li elpensis kaj publikigis tiun „lingvan miksaĵon“ nur, por elpuŝi Volapük'on, la verkon de la katolika prelato Schleyer. Tial — oni diris — katolikoj ne povas entuziasmiĝi por tiu „juda verko“.

Ĉu ne estas malgrandanimeco, pensi tiel? La Germanuja ekskanceliero prof. Michaelis iam konfesis, ke la vere grandaj en la historio homoj ne estas tiuj, kiujn la mondo nomas „granduloj“, sed, kiuj, bone komprenante la volon de Dio pri la mondo, devastigis lumon el si mem en ilia gento kaj per tio en la homaro. Se tio estas vero, certe ankaŭ la kreinto de Esperanto devas esti nomata granda viro kaj lia verko devas esti ŝatata ankaŭ de la katolikoj. Malfidi Esperanton tial, ke ĝi estas kreita de ne-katoliko, estus malnoble. Se oni procedus egalmaniere ĉe ĉiuj aliaj eltrovaĵoj, oni devus ekstermi multajn, kiuj alportis benon al la homaro. Kion homo posedas bonan, tion oni ĉiam devas rekoni. Religiaj demandoj devas esti forigataj el afero tiom grava por la tutmonda homaro.<sup>38)</sup>

Kiu bone konatiĝis kun D<sup>ro</sup> Zamenhof, ĉu persone ĉu el liaj paroladoj aŭ verkoj, tiu estimegis lin kiel fenomenan homon kaj kiel ilon de la Dia providenco.<sup>39)</sup> Li grave respektis la katolikojn kaj ilian kredon. Al Kristanaj gejunuloj li ne nur diris, ke nenio estas pli bela en la mondo ol plena sekvado al instruo de Jesuo, li donis ankaŭ la plej belan ekzemplon de tiu sekvado al ĉiuj dum tuta lia vivo. Li vivis bonkore, pure, modeste, helpeme, ofere, mirinde pacience kun ĉiuj, neniam ofende per ago aŭ parolo kontraŭ iu ajn. Ĉiam simpatie aŭskultema al ceteraj homoj, eĉ al tedaj. Al ĉiuj, edzino, fratoj, gefiloj, nevinoj, amikoj, klientoj, li aperis kiel homo sankta. En turmentoj ĉiu venis al li por konsilo. „Li neniam pekis“, diris malnova Pola servantino, montrante lian portreton sub ŝia krucifikso.<sup>40)</sup> Do, nenio rajtigas la katolikojn, malŝati maljuste tiun viron kaj lian verkon.

---

<sup>36)</sup> El la lasta ĉapitro de la biografio pri D<sup>ro</sup> Zamenhof, verkita de D<sup>ro</sup> Edmond Privat kaj aperigita de la Brita Esperanto-Asocio, London. — <sup>37)</sup> Dr. L. Studeny, Lehrbuch der katholischen Liturgik (Kompendio de la katolika liturgio), Lilienfeld, N.-Oe., 1918, paĝo 19. — <sup>38)</sup> Korrespondenzblatt für den kathol. Klerus in „Menschliche Ideale“ (Koresponda folio por la katolika ekleziularo en artikolo „Homaj idealoj“) 1919, paĝ. 595. — <sup>39)</sup> H. Nienkamp, Dr. Zamenhof, Schöpfer des Esperanto (D<sup>ro</sup> Z., kreinto de Esperanto), paĝ. 15<sup>a</sup> kaj sekv. — <sup>40)</sup> D<sup>ro</sup> Edm. Privat, biografio pri D<sup>ro</sup> Zamenhof aperinta ĉe la Brita Esperanto-Asocio (Esperanto 1920, n<sup>o</sup> 235 (3), paĝ. 50.

# Mondjunularo Katolika („Moka“).

Sidejo: Graz (Aŭstrujo), Karmeliterplatz 5. Ĉef-sekretario Sro Hans Sappl.

## Kio estas „Moka“?

„Moka“ estas sendeviga labor-unuiĝo de la tutmonda katolika (ankaŭ studenta) junularo, por kunlaboro al la repacigo kaj interkompreniĝo de la popoloj sur la bazo de praktika Kristanismo. „Moka“ estas Ligo de idealaj junuloj en la tuta mondo, ligilo de la katolika junularo.

## Kion volas „Moka“?

„Moka“ celas speciale la realigon de personaj interrilatoj de la tutmonda katolika junularo je interŝanĝo de ideoj kaj spertoj de la katolika junula kaj studenta movado.

„Moka“ volas helpi, krei per amo al la homaro regnon, en kiu estru libereco kaj ĝojo.

„Moka“ volas ankoraŭ pli intense labori, por prepari la fundon por interkompreniĝo kaj fina paciĝo, por ke estonte militoj fariĝu neblaj kaj venu nova tempo, pri kiu la junularo songas.

„Moka“ volas komenci la novkonstruon ĉe ni mem, per silenta mem-elektita laboro. Ni volas helpi nin reciproke ĉiumaniere. Per nia privata laboro ni helpas ankaŭ al nia ĉirkaŭantaro. Per nia unuiĝo ni donos fruktojn de nia laboro al vastaj rondoj. Ni volas labori konscie por la homaro kaj por la Dia regno ke la amo de Kristo regnu inter la homoj. Tio estas nia plej alta celo, kiu montras al ni la vojon.

Ni volas pacan interrilaton de la ŝtatoj, veran Ligon de la popoloj. Ni mallaŭdas ĉiun perfortan politikon de la interna kaj ekstera vivo de la ŝtatoj. Ni kondamnas ĉiun sangan batalon kaj militon kaj volas, ke la homoj ne plu malpaciĝu pro aferoj, al kiuj mankas senco, sed, ke ili kune laboru por la eternaj bonoj de vera kulturo. Ni volas la regnon de Kristo sur la tero.

Ni volas kunhelpi, ke la katolikoj ĉiulandaj unuiĝu en „Internacio Katolika“, por kiu la organizo jam ekzistas en „Ika“. Ni volas, ke pli kaj pli multe da katolikoj lernu la lingvon „Esperanto“ kiel „katolikan lingvon“ kaj tiamaniere povu interrilatiĝi.

Ni celas la unuiĝon de ĉiuj katolikaj pac-amikoj tutmondaj al kreo de potenca katolika internacia mondpac-movado laŭ la ekzemplo de la mondpac-ligo „Kruco Blanka“.

## Ĉu ni bezonas „Moka“n?

En la tuta mondo kolektiĝas junuloj kaj junulinoj ĉirkaŭ la ruĝaj standardoj de la komunismo. En revolucia eduka laboro oni celas fari el ili anojn de tutmonda revolucio. En kunsido de la komunista junula internacio oni decidis, ĉiamaniere disvastigi la komunistajn ideojn inter la junularo. Post demando en diversaj landoj oni ricevis la respondon, ke la komunista junula movado jam estas tre disvastigita. Se ilia laboro estos daŭrigata, la komunista junula internacio baldaŭ ampleksos la tutan terglobon.

Kaj ni katolikaj gejunuloj? Ĉu ni rigardu senage, kiel niaj kontraŭuloj klopodas, formi ringon ĉirkaŭ la eklezio? Ĉu ne estas esence laŭ nia sankta universala katolika eklezio, same unuiĝi? Ĉu ne nia katolika junularo tutmonda ankaŭ donu manon unuj al la aliaj por amiko-Ligo, por Ligo de vera Kristana amo, de malfalsa kamaradeco? Ĉu ne ankaŭ ni helpu, fondante potencon katolikan junulan internacion, al niaj fratoj en fremdaj landoj, kiuj havas la samajn celojn, kiajn ni? Ni do bezonas katolikan tutmondan Ligon de junuloj!

## Kiam kaj kie „Moka“ estis fondata?

Jam dum la 1919<sup>a</sup> la mondpac-ligo „Kruco Blanka“ komencis tiun laboron. La definitiva fondo okazis dum la sesa katolika internacia kongreso en Hago (Aŭgusto 1920<sup>a</sup>).

### **Kie estas la sidejo de „Moka“?**

En la sidejo de la „Internacio Katolika“, Graz (Aŭstrujo Stirio), Karmeliterplatz 5.

### **Kiu povas fariĝi membro de „Moka“?**

Membro povas fariĝi junuloj kaj junulinoj, kiuj partoprenas en la laboro de „Moka“ kaj subtenas ĝin ĉiumaniere.

Oni diferencas:

a) aktivajn membrojn, de kiuj persona kunlaborado por la celoj de la Ligo estas postulata. Ili pagas jaran kotizon de 2 Sm. laŭ nacia valuto kaj ricevas por tio la Ligo-organon de „Moka“;

b) subtenantajn membrojn, kiuj pagas jaran kotizon de almenaŭ 1 Sm. kaj ricevas por tio la organon de „Moka“;

c) anojn, kiuj iamaniere volas subteni la Ligon. Ili pagu kotizon laŭpove.

d) korporaciajn membrojn, kiuj pagas kotizon de almenaŭ 6 Sm. laŭ nacia valuto kaj ricevas por tio la Ligo-organon.

Al ĉiuj anoj abono de la Ligo-organo estas rekomendata.

„Moka“ estas en sia organizo memstara, sed samtempe junula grupo de „Ika“.

Se en unu loko loĝas kelke da membroj de „Moka“, ili formas lokan grupon. La lokaj grupoj unuiĝas al nacia Ligo de „Moka“.

### **Kiu gvidas „Moka“n?**

La prezidantaro de „Moka“ estos elektata dum la internacia konferenco de „Moka“. Ĝis la konfirmo de tiu elekto ĝi konsistas el la ĉef-sekretario de „Ika“ kaj la ĝenerala sekretario de „Moka“. La prezidantaro gvidas la aferojn de „Moka“.

### **Ĉu „Moka“ havas Ligan lingvon?**

La Liga lingvo de „Moka“ estas la internacia helplingvo „Esperanto“ de Dro L. L. Zamenhof, elprovita dum 12 ĝeneralaj kaj 6 katolikaj internaciaj kongresoj. En ĝi estas publiigata la oficiala organo de Mondjunularo Katolika. Ĉiu membro de „Moka“, kiu aktive volas partopreni en la vivo, lernu la lingvon Esperanto.

### **Diversaj komunikoj:**

La novaj kotizoj por „Moka“ estas jenaj: Aŭstrujo 6 Koj, Britujo 2 Ŝiloj, Francujo 2 Fkoj, Hispanujo 2 Poj, Italujo 3 Loj, Germ. 4 Mkoj, Nederlando 1 Guld°, Polujo 6 Mkoj, Svisujo 2 Fkoj.

2 Ni petas ĉiujn delegitojn, traduki la ĉi supran alvokon en la nacian lingvon kaj sendi la tradukaĵon al la redakcioj de la katolikaj ĵurnaloj ktp. Se eble, oni sendu al ni specimenojn.

3. La studentan fakon de „Moka“ en Breslau, prenis sur sin nia fervora komitatano Sro A. Weiss, Dompl 8/9 (Germ.). Ni petas, direkti al li ĉiujn skribaĵojn koncernantajn la studentajn aferojn.

### **La prezidantaro de „Moka“:**

Prezidanto: Sro Dro M. J. Metzger, Graz.

Ĉef-sekr.: Sro J. Sappl, Graz.

### **Komitato:**

Sro Barta en Proseč ap. Skuč, del.

Sro Bartoloni en Pisa, ĉef-del.

Sro Martin en Hospitalet, ĉef-del.

Sro Kemme en Amsterdam, del.

Sro Weiss en Breslau, ĉef-del.

Ĉiuj komitatanoj per tiu ĉi elekto fariĝis „landaj delegitoj“. Ni petas pri baldaŭa sciigo, ĉu la unuopaj komitatanoj akceptas la oficon.

### Lokaj grupoj de „Moka“:

Breslau (Germ.): Prez. ĉef-del. Sro Weiss (25 membroj).

Bromberg (Pol.): „Antaŭen kun Kredo“ (25 membroj).

Graz (Aŭstr.): Prez. del. Sro Hasenbichler (5 membroj).

Pisa (Ital.): Prez. del. Sro Bartoloni (la grupo aliĝos kiel loka grupo).

Vsejany (Ĉeĥosl.): Sekr. del. Sro Gabriel (25 membroj).

Lokaj grupoj estas fondotaj en München, Deutsch-Krone, Himmelberg, Wien, k. a. lokoj.

### Oficialaj delegitoj de „Moka“

ekzistas ĝis nun en jenaj landoj kaj urboj:

#### Aŭstrujo:

Flatschach (Karintio): Sro F. Amtman.

Graz (Stirio): Sro Hasenbichler, stud., Karmeliterpl. 5.

Himmelberg (Karintio): Sro J. Koppitsch, ĉef-del.

Klagenfurt (Karintio): \*Sro J. Bartmä, stud.

Salzburg (Salcburglando): Sro F. Huber, Mönchsberg 5.

Werschling (Karintio): Sro J. Koppitsch.

Wien: \*Sro F. Scheibl, Sobieskig. 25, ĉef-del.

#### Ĉeĥoslovakujo:

Böhm.-Leipa: Sro J. Lourin, Kreisgericht.

Praha: Sro E. Jindra, Bojisté 5.

Proseč ap. Skuč: Sro A. Barta.

Vsejany: Sro V Gabriel.

#### Francujo:

Bourg-la-Reine (Seine): Sro R. Bürg, 12, avenue Galois.

Dijon: Sro M. Petit, Chabot Charny 33.

Montargis: Sro J. Champdavoine, École St. Louis.

#### Germanujo:

Amberg (Bavarujo): \*Sro G. Hopfner.

Bamberg (Bavarujo): Sro M. Haupt, Riegelhofg. 6.

Berlin: Sro T. Heinrich, Koppenstr. 69.

Beuthen, O/S.: Sro A. Mainka, Wilhelmstr. 20.

Bonn: \*Sro J. Heinsberg, stud. teol.

Breslau: Sro A. Weiss, Dompl. 8/9, ĉef-del. — Sro O. Poser, Vorwerkstr. 45, vic-del.

Deutsch-Krone: Sro K. Lind, Seminar. — Sro H. Tietze, Seminar, vic-del.

Düsseldorf: Sro G. Milles, Dorotheenstr. 37.

Erlangen: Sro J. Engst, stud.

Furth (Bavarujo): Sro R. Gonetz.

Gross-Strehlitz, O/S., Sro E. Szmelczynski, Krakauerstr. 14.

Köln: \*Sro H. Harkämper, Zülpiderstr. 19.

Mainz: Sro E. Kuhn, stud., Priesterseminar.

Mühlendorf: Sro A. Gassner, Bauernverein-Lagerhaus.

München: Sro J. Bernhard, Guldeinstr. 32/3, ĉef-del.

Norb. Neuss: Sro J. Schmitz.

Nürnberg: Sro F. Gölz, Helmholtzstr. 2.

Oppeln, O/S.: Sro Fethke, Ring 11.

**Hispanujo:**

Hospitalet (Barcelona): Sro F. Martin, stud. teol., Peruzzo 14.

**Hungarujo:**

Ujhartyán; Sro R. Bartal, pastro, prov.-del.

**Italujo:**

Cranglio ap. Aiello: Sro V. Foschian.

Firenze: Sro A. Guerra, Borgo Pinti 5p. p.

Pisa: Sro A. Bartoloni, Via S. Agostino 29, ĉef-del.

Villastellone: Sro K. Clerico, stud. teol.

**Litovujo:**

Kaunas: Sro R. Blazys, Seminarium.

Siauliai: Sro P. Gaigelas.

**Nederlando:**

Amsterdam: Sro H. N. Kemme, stud. med, v. d. Helststr. 15.

's Hertogenbosch: Sro H. A. Roelofs, Ververstr. 42.

**Polujo:**

Bromberg: Sro F. Prengel, Podgorzestr. 17, ĉef-del.

Przemysl: Sro T. Pacula, Sw. Jana 7.

Siedlce: Sro C. Pruski, ulica 3 go, Maja 28.

**Svisujo:**

Gerlisweil ap. Luzern: \*Sro A. Staffelbach, prov.-del.

\* \* \*

La per \* markitaj delegitoj ankoraŭ ne scipovas korespondi Esperante. Ĉiu membro estas rajtigita, uzi la servojn de la delegitoj laŭ la regularo. Ni petas nepre ĉiujn membrojn nomi al la centrejo kataja junulojn, kiuj povus preni sur sin la taskon de delegito de „Moka“. „Moka“ baldaŭ devas havi centon da delegitoj. Ankaŭ en Britujo, Bulgarujo k. a. landoj ni volonte akceptas delegitojn. Laŭ la nova regularo de „Moka“ la centrejo baldaŭ eknomos regionajn kaj naciajn delegitojn.

---

## Sciindaĵoj.

„Reĝino de la Esperantistoj.“ Por statuo de Sta Mario, Reĝino de la Esperantistoj, kiun proponis ĝiatempe Pro Decoene, C. Ss. R. en Wien (v. E. K. 1:21, p. 19) Pro K. Preller, O. Praed, en Nijmegen, Nederlando, donacis 10 Hol Guldojn, kiuj estas konservataj, kune kun la donacitaj por tiu sama celo de Sro Chiba en Wien 30 Koj. ĝis ebla efektivigo de tiu tre bela ideo, pri kiu Pro Preller skribis i. a.: Unue ŝi (Sta Mario) devas helpi nin, propagandi Esperanton por granda utilo de la katolika afero. Due, kiam Esperanto jam estos tre disvastigita, ŝi protekos nin kontraŭ la malbona uzo, kiun oni ne peterlasos fari el nia helplingvo.

Tria oficiala aldono al la universala vortaro de Esperanto estas preparata de la koncerna sekcio en la Esperanto Akademio, kaj post la definitiva starigo de tiu la Akademio publikigos kompletan radikaron el la Universala Vortaro kaj la tri aldonoj al ĝi kaj prizorgos diverslingvan tradukon de ĉiuj oficialaj radikoj krom en la lingvo de la Universala Vortaro ankaŭ en Hispana, Itala kaj Sveda aŭ Dana lingvoj.

**La Foiroj kaj Esperanto.** Nun ankaŭ inter la komercistaro tutmonda jam vekigis la intereso por internacia helpa lingvo, sendube tre bezonata por komercaj interrilatoj kun ĉiuj landoj. Alie ne estas komprenebla la fakto, ke unu post la alia la komitatoj preparantaj foirojn en la centroj de komerco, dissendas invitojn verkitajn en Esperanto. Ni jam ricevis jenajn: Printempa granda foiro en Praha, 28<sup>a</sup> de Februaro ĝis 8<sup>a</sup> de Marto 1921<sup>a</sup> (oficejo: Praha I, Staroměstská radnice, Ĉeĥoslovakujo); Printempa foiro de Leipzig, 6<sup>a</sup> — 12<sup>a</sup> de Marto 1921<sup>a</sup> (oficejo: Leipzig, Markt 4, Germanujo, Sakslando); Internacia printempa foiro en Breslau, 5<sup>a</sup> — 8<sup>a</sup> de Aprilo 1921<sup>a</sup> (oficejo: Breslau, Ohlauerstr. 87, Germanujo, Silezlando), kaj II<sup>a</sup> oficiala foiro de specimenoj en Barcelona, 20<sup>a</sup> — 30<sup>a</sup> de Aprilo 1921<sup>a</sup> (oficejo: Barcelona, Plaza Antonio Lopez, 15, Hispanujo).

**La venko de la batalado pri instruado en Nederlando.** La 26<sup>an</sup> de Oktobro 1920<sup>a</sup> estis por la Nederlandaj katolikoj tago memorinda kaj ĝojiga. En la ŝtata ĵurnalo aperis la nova leĝo pri instruado, sendube konsiderebla kiel unu el la plej gravaj politikaj okazintaĵoj dum la laste pasintaj 50 jaroj. La 30<sup>an</sup> de Junio la projekto estis akceptata de la Dua Ĉambro (Ŝtata Re prezentantaro), kaj la Unua Ĉambro (Senato) ĝin aprobis la 7<sup>an</sup> de Oktobro. Tiu akcepto signifis, ke de nun, same kiel por la ŝtataj lernejoj ankaŭ por la katolika (Kristana) instruado ĉiuj kostoj (salajroj de la instruistaro, elspezoj por la konstruaĵoj, lerniloj, ktp.) estos pagataj el la ŝtata kaso. Tio estis atingita nur per unueco kaj persisto.

Solenaj diservoj okazis laŭ la deziro de la episkopoj en la diversaj eparĥioj, kaj vespere fest-kunvenoj estis aranĝataj en la ĉefaj urboj Amsterdam, Den Haag, Haarlem, Utrecht k. a.

De nun estos eble, realigi la idealon de la Nederlanda episkoparo: „Flanke de ĉiu katolika preĝejo starigi katolikan lernejon“. Kiu havas la infanojn por si, tiu havas por si la estonton, do, Nederlando sendube iras renkonte al belega estonto.

**Doktoro de filozofio** fariĝis la sekretariino de AKLE, F<sup>no</sup> E. Pockberger, la 21<sup>an</sup> de Marto, ĉe la universitato en Wien.

**Helpo-petoj** nun ankaŭ jam pli kaj pli ofte estas verkataj en Esperanto. Tiamaniere Pro P. Hoffmann, O.S.B., prokuroro de la misia monaĥejo Schweiklberg en Malsupra Bavarujo, elpetas subtenadon de la misioj de „Mario-Helpo-Unuiĝo“ de la Germanaj Benediktanoj-misiistoj per donacoj kaj la paroĥestro A. Bruckner en Gloggnitz (Malsupra Aŭstrujo) financan helpon por la Laborkomuno de la katolika organizaĵo por Gloggnitz kaj ĝia ĉirkaŭo. Tiun peton rekomendis la altranga protektoro de „Espero Katolika“, la kard.-ĉefepiskopo en Wien, Dro F. G. Piffl, Donacantoj, kies eĉ plej malgranda dono en ilianacia mono multobligas por Aŭstrujo, honoras per tia sian nacion, oferdonante por ilia kredo. Iliaj nomoj daŭre estos konservataj al dankamemoro en „libro de oferdonoj“. La petfolioj estas mendeblaj ĉe la supre cititaj adresoj.

**Dua diskuta kunveno** de Esperantistoj en Iberaj landoj, por fondi Iberlandan Esperantistan konfederacion, kiu iniciatu internacian interkonsenton, oficialigi Esperanton en la komercaj kaj sociaj rilatoj sciencaj, kongresaj universalaj kunvenoj k. a., okazos de la 26<sup>a</sup> ĝis la 28<sup>a</sup> de Majo en Zaragoza. Aliĝoj estu anoncataj al Dro D. Maynar, vic-sekr. de Aragona Esperantista Federacio, en Zaragoza (Hispanujo), str. Cerdán 19, pral.

**La Komerca kaj Metia Ĉambro en Reichenberg** (Ĉeĥoslovakujo) akceptas kaj respondas en la lingvo Esperanto korespondaĵojn Esperantlingvajn, tute simpatiante kun la Esperanto-movado.



## Petoj kaj Demandoj.

**Graco: Koncepti.** Nia Via en Hago i. a. ankaŭ unuecigis la tekston de la ĉefaj katolikaj preĝoj. Komisio (ne „komisiono“\*) kiel oni ofte povas legi), kreita por tiu celo, daŭrigas sian laboradon.

La teksto de „Saluton, Mario“ kaj de „Mi kredas“ necesigis la sankcion de du nefundamentaj vortoj, jam uzitaj en la katolika Esperanto-literaturo.

„Graco“ en la senco de la katolika doktrino tute ne estas anstataŭebla per la vorto „favoro“ aŭ „Difavoro“. Pri tio plena unueco regis en la komisio konsistanta el pastroj kaj laikoj.

„Konceptita“ ni legas en „Mi kredas“: „... kiu estas konceptita de la Spirito Sankta...“ Ĉu tiel la Latina originalo bone estas tradukita?

Esceptinte la vere teruran tradukon en „Migrukunmi“: „... kiu estis embriigita“, la plej multaj aŭtoroj akordiĝis jam ĝis nun pri „koncepti“.

Laŭ mia opinio la komisio en Hago bone evitis eblan konfuzon per la elekto de la radiko „koncepti“, ĉar la Germanlingvaj Esperanto-vortaroj de Christaller, Steier, Jürgensen k. a. citas „koncepto“ en la senco de „malneto“. Dr<sup>o</sup> Zamenhof mem aprobis la radikon „koncept“, kvankam ĝi ne estas fundamenta vorto aŭ apartenanta al la „Oficiala Aldono“. Steier citas „koncept“ sen steleto; Devjatnin ne konas la radikon „koncept“ en lia „Afiksaro kun plena oficiala radikaro“.

Estus interese, sciigi, ĉu la Angla-, Franca- kaj alia-lingvaj Esperanto-vortaroj ankaŭ enhavas la vorton „koncepto“ en la senco de „malneto“. La Germana lingvo ja konas „koncept“, derivinte ĝin el la Latina lingvo. Sed la Angla lingvo uzas por „koncepto = malneto“ nur: „first (aŭ: rough) draft aŭ: copy, minute“; la Franca: „brouillon, minute“.

Ciukaze mi rekomendas baldaŭan akcepton ne nur de „graco“ kaj „koncepti“ en la „Oficiala Aldono“ sed ankaŭ de „koncepto“ en la senco de „malneto“, kiu lasta, laŭ mia opinio, estas vorto formita mallerte, malgracie.

M. Mielert-Breslau.

---

\*) Mi permesas al mi, rimarkigi la estimindan aŭtoron de la supra teksto, ke li certe estas malprava pri la uzado de la vorto „komisio“ anstataŭ „komisiono“. Efektive, oni devus uzi en la senco de la nun jam en diversaj Esperantlingvaj gazetoj en raportoj k. s. ofte legebla neologismo „komisiono“ la vorton „komisiitaro“, ĉar nur tiu vorto taŭgas, por karakterizi personojn, kiuj de iu ricevis la „komision“, fari ion antaŭskribitan al ili. Ŝajnas, ke al la iom peza, ne facile flue parolebla esprimo „komisiitaro“ oni preferas la de ĉiu komprenotan „komisiono“ en tiu speciala senco.

J. Sch.

**Esperantistaj poŝtoficistoj atentu!** Mi oficas en la supera poŝta direkcio por la Teritorio de la Libera Urbo Danzig kaj prilaboras ĉiujn kontraktojn kaj korespondaĵojn kun eksterlandoj; mi do deziras, uzi kiom eble plej multe Esperanton kaj petas insiste ĉiujn geoficistojn poŝtajn, telegrafajn kaj telefonajn, ke ili iru aŭ skribu al tiuj oficistoj en aliaj ŝtatoj, kiuj ankaŭ oficas en oficejo por eksterlandaj aferoj, kaj instigu ilin pro korespondado oficiala en Esperanto. — Oficistoj, kiuj prilaboras eksterlandajn korespondaĵojn, unuavice nepre devas lerni tuj Esperanton. La uzado de nia lingvo en ofico estas la plej grava propagandilo. Oficistoj de eksterlandaj poŝtoficjoj aŭ de por-eksterlanda fako de poŝtaj direktoj bonvolu tuj informi la superan poŝtan konsiliston Sron O. Reber en Bamberg (Germanujo), prezidanto de Internacia Ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj.

B. Ketterling,  
supera poŝtsekretario, en Danzig,  
prez. de Danziga Esp.-Asocio, del. de U.E.A.

**Al Fajrobrigadistoj!** La membro de la Esperanto-grupo en Teplitz-Schönau (Ĉeĥoslovakujo), Sro Czermack-Warteck, proponas jenon: „Konsiderante, ke la fajrobrigado ne konas nacian ĵaluzon, ne traktas politikon, sed estas destinata nur, por servi al la homaro, plue, konsiderante, ke post la

terura milito tutmonda la nacioj devas kunhelpi por atingo de tiaj noblaj celoj en komuna kaj kamarada laboro, mi proponas kiel kunfondinto kaj dumviva membro de la Internacia Fajrobrigada Estraro kaj kiel honora membro de preskaŭ ĉiuj fajrobrigadaj asocioj: anstataŭ la ĝisnunaj tri oficialaj lingvoj, la Franca, la Angla kaj la Germana, estu enkondukata kiel koresponda kaj debata lingvo de la „Internacia Fajrobrigada Estraro“ la internacia helplingvo Esperanto. La detaloj devas ankoraŭ esti preparolataj; sed, por konvinki Sro<sup>n</sup> Czermack, ke lia propono estos entuziasme aprokata, ni petas ĉiujn samideanojn, precipe anojn aŭ estraranojn de fajrobrigadoj aŭ savo-societoj, skribi konsente al li sub jena adreso: Sro<sup>n</sup> R. Czermack-Warteck, Teplitz Schönau (Ĉeĥoslovakujo), Giselastr. 21.

La „Ika“-direktoro por Hispanujo, Pro M. Mojado en Madrid, Abascal, 13, pral. A, petas, ke oni sendu al li ĉiujn informojn pri la katolika movado.

**Propagando.** Sro J. Cesarini, del. de UEA., en Potenza (Italujo) petas eminentulojn, skribi al Lia episk. m. Msro R. Razzoli (vidu: Italujo en „Kroniko“ de tiu ĉi numero) danke kaj montrante al tiu eminentulo, kiu pro multego de okupadoj nun ne multe klopodas por Esperanto, pri la beleco de nia idealo kaj instruante lin precipe pri „Ika“. Lia daŭra helpo estus grava apogo por la Esperanto-movado katolika en tiu regiono de Italujo.

**Samideanoj en ĉu lando!** Bonvolu sendi al Esperanto Asocio de Nordameriko skribaĵojn rilate la progreson de Esperanto en via urbo, distrikto, aŭ lando, ĉar ni deziras kaj bezonas ricevi informon antaŭ la dato de nia Kongreso (en Boston dum Julio), por ke ni havu trafajn faktojn por la lokaj ĵurnaloj, kiuj devas esti interesataj. La faktoj tiel ricevitaj ankaŭ utilos al la Praha-Kongreso (dum Aŭgusto); ni prizorgos, ke ĝi ricevos ilin. Nia adreso estas: Esperanto Asocio de Nordameriko, 57, Pierce Bldg., Boston 17, Mass., U.S.A.

**Por baldaŭ elironta revueto Esperanta-Ladina** sendu tradukaĵojn el Germana aŭ Slavaj lingvoj koncernantaj Friulion (provincoj Gorica kaj Udine) aŭ Ladinion (Dolomit-regiono de Tirol-kaj Trento-lando) kaj la Svisan kantonon de Grizonoj al la Librejo Zorutti, via Gombruti 5, Bologna. Preferataj estas artikoloj pri Ladinaj aŭ Reto-Romanaj dialektoj kaj pri la popolaj moroj kaj legendoj de tiuj regionoj. Ankaŭ ilustraĵoj estos publikigataj.

**Interŝanĝi Esperantaĵojn kaj naciajn ilustr. gazetojn kun ĉiulandanoj** deziras Sro J. della Savia, del. de UEA, en Udine, Via di Toppo, 11.

**Interŝanĝi** deziras poŝtmarkojn kun serioze kolektantoj ĉiulandaj Sro F. Kraus en Praha II, Petrá ul 25, Ĉeĥoslovakujo. Li ĉiam tuj respondos.

**Por perfektigo en Portugala lingvo** serĉas Portugallingvajn gazetojn kaj similajn presadojn Sro G. Naegele, korespondisto en razilfabriko. F. Ern kaj Komp. en Weyer ap. Solingen, Germanujo, Rejnlando. Volonte li reciproke servos iel laŭ deziroj.

**Poŝtmarkojn perfektajn Turkujajn kapitulaciajn kaj aliajn maloftajn** sendas Pro E. Schmitz en Haifa, St. Charles. Palestino, al ĉiu sendinto iulanda de egalvaloraĵ maloftaj laŭ Senf aŭ Yvert 1921.

---

## Kroniko.

**Ĉeĥoslovakujo.** La katolika mondo vikle kaj rapide progresas, malgraŭ ĉia persekutado kaj perfortado de multaj kontraŭuloj. Abomena agitado por senreligiigo, malebligado de kataj kunvenoj, forrabado de kataj preĝejoj por la t. n. Ĉeĥoslovakuja eklezio“ ktp. malfermas la okulojn al multe da ĝis nun indiferentuloj. La devizo: For de Roma! komencas havi malan efikon. La popol nombrado ne montros la ĝustan nombron de katolikoj en Ĉeĥoslovakujo, al kiuj amase revenas delogitoj per ruzo aŭ perforto. Kataj organizaĵoj ĉiufakaj kreskas, kaj ilia nombro pliiĝas. La organizaĵoj de gejunularo jam atingis la nombron 430, memstaraj unuiĝoj de „Orel“, kata gimnastikanaro, ekzistas jam

370. Novaj gazetoj ĉiuspecaj eliras; „Lid“ („La Popolo“), ĉiutaga organo de la ĉefa organizaĵo „Popola partio“ atingis pli ol 1200 novajn abonintojn. En la parlamento efike laboras 33 kataj deputitoj, laŭ la nombro la duaranga inter la ekzistantaj partioj, inter ili la eĉ de kontraŭuloj ŝatata politikisto Msro Šrámek, la ĉefepiskopo Stojan, la bienestro Šamalik k. a. Ĉiuj gvidantoj de la kata movado forte interesigas pri la internacia kata movado kaj interrilatas kun la katolikaro en ĉiuj landoj. La ĉefaj kataj gazetoj favore akceptas raportojn ankaŭ pri la Esperanto-movado. En Praha okazis kunveno kaj parolado pri Esperanto en la unuiĝo de kata gejunularo. A. B.

**Germanujo.** Sro M. Mielert, gimn. instr., la prezidanto de „Unueco“, finis kurson kun proks. 25 partoprenintoj, al kiuj apartenis i. a. ankaŭ la kata urbo- kaj distrikt-lernej-inspektoro Sro Dro Hemmerle, tre bone konata per liaj sekse-pedagogiaj verkoj. Sro Driessler, rektoro de mezgrada lernejo, aranĝis publikan Esperanto-ekzamenon por 16 lernantoj el la plej supera klaso. Ĉeestis i. a. ankaŭ la urba lernej-konsilisto Sro Dro Lauterbach, kiu estis promesinta, ke laŭ la sukceso de la ekzameno li eventuale enkondukos Esperanton oficiale en la lernejo de rektoro Driessler. La sukceso superis liajn atendojn. La lernintoj post 60horo instruado povis uzi la lingvon en vorto kaj kanto, parolis flue en ĉarma „sceno en ĉapelmagazeno“, tradukis tekstojn sufiĉe malfacilajn sen antaŭa preparo ktp. Do, post Pasko Esperanto estas enkondukita kaj instruata dum du horoj en ĉiu semajno en la du plej superaj klasoj de la nomita lernejo. — Sekvante la proponon de Sro Mielert la „Katolika instruisto-unuiĝo de Breslaŭ“ aliĝis al „Ika“ kiel ordinara membro, Sro Hanuschke, instr. en mezgrada lernejo, estis elektita kiel reprezentanto de la unuiĝo por „Ika“-aferoj kaj por la fondota Germanuja land-komitato. — Sro Mielert paroladis en „Kata komercisto-unuiĝo“ en Hirschberg (Silezujo) pri la temo: „La mondhelplingva problemoj kaj ĝia solvo per Esperanto“. La entuziasmigita aŭdantaro decidis, fondi katan lokan grupon de „Buked“ kaj tuj komenci Esperanto-kurson, kiun gvidos Sro Fritsch, kaplano. — La fermofeston de la komenca kurso de „Kata Esperantogrupa München'a“ ĉeestis Sro Sappl veninta el Graz, kie li nun funkcias fervore kiel la organizanto de „Moka“. Dum la ĝenerala kunsido de la fondita de li grupo li estis eknomita honora membro pro liaj gravaj meritoj por la grupo-prosporo. Sro Bernhard sukcesis kiel la unua membro el la grupo en la ŝtata ekzameno pri kapableco en Esperanto. Post la Pasko-festokursoj en diversaj kataj unuiĝoj en la urbo estis komencataj kaj la Esperanto-vivo en München vige kreskas. J. B.

**Italujo.** Lia episk. m. Msro R. Razzoli, tre klera eminentulo, gardisto de la Sta Tombo, estas elektita hon. prezidanto de la Esperanto-grupo en Potenza kaj hon. kons. de „Ika“. Li partoprenis kun bela parolado Esperanto-feston de la ekspozicio, donis ejon kaj monhelpon por ĝi kaj abonis la Italujan Esperanto-revuon. J. C.

**Jugoslavujo.** Ĉefe en Zagreb la Esperanto-movado faras grandajn progresojn. Por atingi tiun celon, la societo „Društvo Esperantista“ aranĝis dum la pasinta jaro tri grandajn ekspoziciojn. En ili krom Espaj verkoj, reklamiloj, poŝtkartoj, fotografiaĵoj k. a. estis prezentataj proksimume 200 diversaj gazetoj: la plej interesa ekspoziciaĵo, ĉar al vizitantoj per ili estis montrate, ke efektive Esperanto estas disvastigita jam en la tuta mondo. Sed skeptikuloj inter la vizitantoj rigardis la datojn de ĉiuj gazetoj kaj trovis, escepte „Esperanto“ de UEA, neniun gazeton kun postmilita dato; ili do restis sur ilia vidpunkto, ke Esperanto dum la milito perdis sian valoron kaj siajn asertojn pri ĝi ili subtenis per rimarkigo pri manko de novaj gazetoj. La supre nomita societo multe suferas pro manko de mono; ne estas eble al ĝi, aĉeti ĉiujn gazetojn Espajn, kiuj aperas sur la terglobo. La societo intencas baldaŭ denove fari grandan propagandan ekspozicion; ĝi petas la administrantojn de ĉiuj Espaj gazetoj, frate kunhelpi ĝiajn klopodojn kaj per tio la Esperanto-movadon en Zagreb, per sendado de almenaŭ unu ekzemplero de Espaj gazeto por tiu celo al la sekretario de „Društvo Esperantista“, Sro A. Bertoli u Zagrebu, Filipovićevo prilaz 6.

## Literaturo, Muziko kaj Arto.

**Prof. Grosjean-Maupin:** Dictionnaire Complet Esperanto - Français (Kompleta Vortaro Esperanto-Franca). 2<sup>a</sup> eld. Paris. 1921. Esperantista Centra Librejo, 51 rue de Clichy (IX). Prezo: 6 Fkoj. La dua eldono de tiu vortaro zorge reviziita, korektita kaj kompletigita, tre diferencas de la unua. Krom ĉiuj radikoj de la Universala Vortaro kaj de la du Oficialaj Aldonoj ĝi enhavas sufiĉe multajn neoficialajn radikojn enkondukitajn de Zamenhof aŭ de aliaj aŭtoritataj aŭtoroj. Apud ĉiu el tiuj radikoj la verkinto sciigas precize la ĉefajn vortaristojn aŭ aŭtorojn, de kiuj ili estas akceptitaj aŭ uzitaj. Tiam kolekton oni trovas en neniu el la ĝisnunaj vortaroj por nia lingvo.

**Ses Noveloj el la Hungara literaturo** (De: Jókai, Mikszáth, Herczeg kaj Molnár). Mendebla ĉe Sro P. Balkányi, del. de UEA en Budapest VI (Hungarujo). Hajós u. 15, II. — La tekstoj kolektitaj en tiu ĉi libreto unue estis presataj en „La Verda Standardo“ kaj „La Revuo“. Ili bone spegulas la penso- kaj vivmanieron de Hungaroj kaj certe povas interesi legantojn.

**Dr. A. Möbusz:** Vollständiges Lehrbuch der Welthilfssprache Esperanto. 4<sup>a</sup> eld. Eldonejo O. Nemnich en München. Inter la multaj jam ekzistantaj Germanlingvaj lernolibroj por Esperanto tiu de Dro Möbusz certe estas unu plej rekomendinda pro la praktika aranĝo de la lernmaterialo, la sistema enkonduko en la esencon de nia lingvo kaj la lerte elektita ekzercaro en ĉiuj 15 lecionoj. La aŭtoro ankaŭ ne forgesis, laŭ la deziro de Zamenhof, aldoni ties regularon el la Fundamento. La preso kaj la ekstero de la libro estas bonaj kaj ĝi taŭgas por instruo en kursoj same kiel por meminstruo. Do, ĝi bone povas helpi akceladon de la nuntempe ĝojige progresanta disvastigo de Esperanto en Germanujo kaj Germanlingvaj ŝtatoj.

**Nova Esperanto-Biblioteko.** Eldonata de la Esperanto-eldonejo F. Ellersiek, Berlin. Po numero 3 Mkoj kaj 20% plikariĝo No. 5. Argus: Pro kio? Internacia kriminal-romano originale verkita. — No. 6. H. Heine: Elektitaj poemoj, tradukitaj de F. Pillath, 2<sup>a</sup> eld. — Jen du libroj vere interesaj kaj rekomendindaj. La unua estas originalaĵo jam konata de la legintoj de la „Kulteno“ eldonita de la Germana Esperanto-servo dum la tutmonda milito. Ĝis nun ekzistas ne multe da originalaĵoj en la Esperanto-literaturo; inter ili la supre nomita certe plaĉos al multaj legantoj. Oni ja rimarkas kelkloke, ke la aŭtoro estas Germano, preferanta vortkunmetojn kaj uzanta jen kaj jen ankaŭ neologismojn ne-necesajn; sed lia stilo estas bona, flua, la disvolvo de la kriminal- kaj am-afero frapanta, la karakterizo de la agantaj personoj trafa, la okazaj reflektaj psikaj kaj moralaj akceptindaj. — La dua libro enhavas zorge elektitajn kaj tradukitajn la plej belajn mallongajn lirikaĵojn de la konata en la tuta mondo Germana poeto Henriko Heine, kies poeziaĵojn jam Zamenhof elektis por traduko. La tradukinto trafis ankaŭ bone la karakteron de spiteco en kelke da ili kaj majstras la ritmon. Tamen mi estus konsilinta al li, diri anstataŭ: Brak' kaj nuko... (p. 25, antaŭlasta linio): Brako, nuko. blankaj, ĉarmaj. . Tiaj malmolaĵoj ofendas senteman orelon. Cetere, la verko ne vane estas rekomendita de Esperantista Literatura Asocio, prezidata de Sro M. Hankel. La fervora eldonisto F. Ellersiek meritas plenan laŭdon pro lia entrepreno. J. Sch.

**Katalogo de Literaturo** vendata de Esperanto-Oficejo Finnlanda, Helsinki, Kasarminkatu 20 — La b oŝureto montras per sia enhavo (Lernolibroj, Finna Biblioteko Esperanta, Skandinava Literaturo, Turisma Gvidlibro, Kongresa Libro, Muziko, Propagandaj Broŝuroj k. a. propagandiloj) la gravan progreson de Esperanto en la lando de la ĝis nun ne multe konita ekster ĝiaj limoj malgranda, sed tre inteligenta, kulturhava norda popolo. Ĉi tie estas ĝusta loko, menciigi ankaŭ kaj rekomendi al la Esperantistaro la bele ilustr. ĉiumonatan revuon „Esperanto Finnlanda“. Interesuloj lasu sendi al si specimenon de ĝi kaj la katalogon.